

ISSN 1846-5021

GAZETO DE  
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

# Zagreba Esperantisto

ԹՈՒՆԱՅԼԻ  
ՉԵՊՅԵՆԻՔՄՈՋԸՄՅ

Ĉi-numere legu pri:

**GRANDA KROATIA SCIENCISTO NIKOLA TESLA  
NACIA PARKO "LAGOJ DE PLITVICE"**

**JARKUNVENO DE KEL: VENKO DE DEMOKRATIO?  
"PADMA, LA ETA DANCISTINO" APERIS  
CENTJARIĜO DE "KONFESO"**

**ESPORE PRI KROATIA/AŬSTRALIA  
ESPERANTISTO JOHN MATASIN**

**DOMINADO DE LA ANGLA  
EN EŬROPA UNIO**

**FORPASO DE BORIŠA MILIĆEVIĆ**

2

2013

**Eldonanto:**

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj  
HR-10000 Zagreb, Goljak 43

**Ĉefa kaj respondeca redaktoro:**

Radenko Milošević  
Goljak 43  
HR-10000 Zagreb  
radenko.milosevic@zg.htnet.hr

**Plenumredaktoro:**

Josip Pleadin  
B. Jelačića 138 A  
HR-48350 Đurđevac  
Kroatio  
josip.pleadin@gmail.com

**Ekspedejo:**

Grafokom, p.p. 96  
HR-48350 Đurđevac  
Kroatio  
grafokom@kc.htnet.hr  
zagreba.esperantisto@gmail.com

**Redakcianoj:**

Krešimir Barković, Snježana  
Habulin, Marija Jerković, Jozo  
Marević, Radenko Milošević,  
Josip Pleadin

**Presis:**

Grafokom, Đurđevac

**Aperritmo:**

Dumonata

**Konto de UZE:**

HR7923400091110321529  
(Privredna banka, Zagreb)

**UEA-kodo:**

uzes-y

## RESUMO

Ni vivas en tre streĉa kaj tre ŝanĝiĝema epoko. La 1-an de julio Kroatio fariĝis la 28-a membro-ŝtato de Eŭropa Unio, kio al kroataj esperantistoj alportas novajn defiojn. La defioj respeguliĝas en la invitado de kelkaj internaciaj aranĝoj al Kroatio: Universala Kongreso post la jaro 2016, Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en 2014 kaj ILEI-konferenco en iu el estontaj jaroj. La kandidatigon por la UK subtenis la urbestro de Zagreb s-ro Milan Bandić, kaj la oficiala kandidatiĝo estis transdonita al UEA dum la Universala Kongreso en Rejkjaviko. La kandidatigan leteron al ILEI transdonis Marija Jerković dum la ĉi-jara ILEI-konferenco en Herzberg am Harz, kaj la 10-an kongreson de Eŭropa Esperanto-Unio aŭspicias la urbestro de Rijeka. En aŭgusto okazos Adriatika feriado kaj Boatado sur la rivero Kupa. Septembre esperantistoj de Bjelovar aranĝos lokan programon okaze de Tago de la urbo, kies parto estos ankaŭ Deklamkonkurso, celanta anstataŭigi la ĉesigitan Konkurson pri scio de Esperanto. Daŭre okazados Verkista renkontiĝo en Hraščina. La eldona agado pluiras laŭ difinita ritmo. Eldoniĝis nova libro de Tibor Sekelj, la sona eldono de "Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić", okazas bibliografiado kaj ciferecigo de malnovaj gazetoj, regulaj prelegoj en Zagreb ktp.

Kontraste al tio, en la landa movado jam de jaroj daŭras malkonkordo, ĉefe ĉar la Estraro de Kroata Esperanto-Ligo gvidas aŭtokrate la organizaĵon, ne volante dialogi kun sia membraro kaj klarigi la malbonajn agojn el pasintaj jaroj. Formiĝis en Kroatio opozicio kiu ne plu akceptas la ĝisnunan agadmanieron. Eĉ se ŝajnas ke la opozicio estis "disbatita" en la jarkunveno de KEL okazinta la 8-an de junio, la situacio nur pliprofundigis la polusiĝon kaj malebligis aŭ malfaciligis pluan kunlaboron.

Inter la t.n. opoziciuloj maturiĝas la ideo ke KEL fariĝas celo por si mem, ke lokaj societoj ne bezonas ĝin por funkcii. Tio estas danĝera konsciiĝo, estonte grave influonta la ŝrumpo de la membronombro, kiu eĉ sen tio en la pasintaj jaroj draste malmultiĝis. Dum la laste okazinta jarkunveno, la opoziciuloj prezentis siajn opiniojn, kaj estonte distanciĝas disde la zorgo pri la sorto de KEL. Astataŭ perdi tempon en vanaj diskutoj kaj disputoj, oni koncentriĝos al laboro, kiu estas la sola ĝusta vojo en la epoko tiom malfacila kiom estas la nuna.



# JARKUNVENO DE UZE: DIGNA KAJ KUNLABORA

 UZE-estraro

La pasinta elekta jarkunveno de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE), okazinta la 20-an de februaro 2013 en Kroatia ekonomia ĉambro - Ĉambro Zagreb montris, ke malgraŭ la streĉitaj interrilatoj en la enlanda movado, oni povas diskuti kun digno kaj kunlaboremo. Nekutime granda nombro de partoprenantoj kaj gastoj estis signalo ke io moviĝas pozitivdirekte. Post la jarkunveno estis klare, ke nur la jarkunvene spertita komuna diskutado pri la problemoj, en maniero de toleremo kaj kunlaboro, estas la solvo de niaj internaj problemoj. Tian mesaĝon la kunvenintoj dissendas al ĉiuj kroataj societoj kaj aktivuloj, kaj ĝi plene konkordas kun la mesaĝo jam pli frue sendita: **Ni povas kaj volas labori pli bone!** - kies aŭtoro estas nia membro **Jozo Marević**.

La jarkunveno diskutis kaj akceptis la labor- kaj finanĉan raportojn por la jaroj 2011 kaj 2012, ĉar pro diversaj organizaj kaj finanĉaj problemoj, sian lastan jarkunvenon UZE okzidis la 27-an de oktobro 2011, do antaŭ pli ol 15 monatoj. La raportoj, post ampleksa diskutado, estis unuanime akceptitaj. Por la sekva 4-jara mandato estis elektita la nova estraro: **Radenko Milošević** (prezidanto), **Josip Pleadin** (vicprezidanto) kaj **Srećko Radulović** (sekretario). La kontrolkomitato konsistas el: **Marija Jerković**, **Vlado Jurković** kaj **Nikola Turk**.

La diskutadon komencis per sia opinio **Vlado Jurković**, kiu estas malkontenta ĉar la nova societo fondita en Zagrebo portas la nomon de Tibor Sekelj anstataŭ de Ivo Lapenna, ĉar tiu societo devus iasence daŭrigi la laboron de la



malfondita societo “Bude Borjan”, kaj la societon “Bude Borjan” fondis Ivo Lapenna kiu por ĝi trovis la ejon en Amruševa, konatan kiel centro de Esperanto-aktivecoj en Zagrebo kaj Kroatio. Pluraj diskutantoj konsentas kun tio.

**Marija Jerković** atentigas, ke nia origina tasko devus esti organiza kaj instrua laboro, sed ke ĝi preskaŭ ne ekzistas.

**Spomenka Štimec** nome de KEL salutis la jarkunvenon, gratulis pro la atingitaj rezultoj kaj petis ke UZE sendu al KEL la aktulana membroliston. Samtempe ŝi aludis ke laŭeble UZE transprenu la nomon de **Ivo Lapenna**, al kio **Radenko Milošević** replikis, ke eble oni havos forton por fondi novan societon kun la nomo de I. Lapenna. Li ankaŭ asertis ke la movado maljuniĝas, kaj ke maljunaj gvidantoj iom post iom devus cedi la gvidajn funkciojn al siaj pli junaj

kolegoj. Post tio **Milošević** legis la petojn de **Bojana Đuričić**, **Neven Kovačić** kaj **Anto Mlinar** pri retiriĝo el la membreco de UZE, kio estis unuanime akceptita.

**Stjepan Žarina** en sia diskuto diris, ke UZE bone funkcias, ke malgraŭ la malfacilaj kondiĉoj ĝi sukcesis agadi en pluraj kampoj. **Milošević** informis la kunvenintojn pri la peto sendita al Loka komunumo “I. Kukuljević Sakcinski” kun la celo havigi ejon por estontaj semajnaj kunvenoj de UZE.

Diskutante pri la laborplano por 2013, **Josip Pleadin** menciis la jam komenciĝintan aktivecon de kelkaj UZE-anoj en la komuna tradukprojekto “De Patagonio ĝis Alasko”.

**Marija Jerković** informis ke ŝi prelegos en la ILEI-konferenco en Herzberg pri “Kroata poezio dum jarcentoj tradukata

al Esperanto”, kaj ke ŝi volus tie prezenti ankaŭ la gazeton “Zagreba Esperantisto” kaj la ĵus eldonitan “Bibliografion”. Krome, ŝi proponis ke UZE, DEC kaj UPE kune entreprenu la organizadon de ILEI-konferenco dum iu estonta jaro, kaj ke ŝi tion oficiale proponu al la ILEI-estraro dum la ĉi-jara konferenco en Herzberg. Plue diskutante, ŝi menciis ke la porinfana konkurso en Kostrena ne plu okazos, kaj ŝi proponas anstataŭigi ĝin per poezia deklamkonkurso kiun kune organizu UZE kaj aliaj interesiĝantaj societoj, eventuale en Bjelovar. Ŝi ankaŭ petis helpon por kurasnoj en Utrine en formo de lernolibroj.

**Zeljko Zurl** diskutis pri la kunlaboro de CD Radio-klubo el Utrine, en kies ejoj okazas la kurso menciita de **Jerković**, kaj instigis ke tiu kurso fariĝu nova societo aŭ filio de UZE, ĉar ĝis nun ĝi funkciis kiel sekcio de CD Radio-klubo. Nome de kroataj fervojistoj-esperantistoj la jarkunvenon salutis **Marica Brletić**, kiu promesis ke la fervojistoj siaflanke subtenos ĉiujn projektojn de UZE laŭ siaj eblecoj. Ŝian paroladon replikis **Radenko Milošević**, akcentante ke en la pasinteco la du "piedoj sur kiuj firme staris la zagreba movado", estis la malfondita societo “Bude Borjan” kaj la fervojista societo KFEA.

Antaŭ la komenco de la jarkunveno, inter UZE kaj la Esperata sekcio de Societo por rusaj lingvo kaj kulturo estis subskribita kontrakto pri kunlaboro, kaj **Mato Špekuljak**, la gvidanto de la Societo atentigas, ke “Zagreba Esperantisto” devus havi ankaŭ la kroatlingvan enhavon, kaj eventuale oni devus malfermi ankaŭ kroatan version de la portalo de UZE.

**Josip Pleadin** respondas al kelkaj menciitaj temoj. Li konfirmas ke eventuale la deklamkonkurso proponita de **Marija Jerković** povus esti

organizita en Bjelovar jam en septembro ĉi-jare. Pri tiu ideo li informos la Bjelovaran Esperantistan Societon en la sekva estrarkunveno. Li ankaŭ konsentas ke UZE el sia kvanto da lernolibroj donacu al kurso en Utrine la necesajn lernolibrojn, kaj ke “Grafokom” kies posedanto li estas, garantiu libropremiojn por deklamantoj en la konkurso. Samtempe li starigas la demandon al **Spomenka Štimatec**, petante ŝin informi la ĉeestantojn pri la preparado por eventuala UK en Zagrebo. **Spomenka Štimatec** klarigas, ke la jarkunveno de KEL en Koprivnica (junio 2012), akceptis la proponon ke KEL kandidatigu Kroation por gastiganto de iu el estontaj UK-oj. Por fari tion, estas necesa konsento de la urbestro de Zagrebo kaj la konfirmo de Ministerio pri internaj aferoj ke ĝi permesos senbaran eniron de ĉiulandaj kongresanoj en Kroation. Ĉar aktuale okazas preparoj por lokaj balotoj, ne eblas havigi la necesajn dokumentojn antaŭ ol la balotoj pasos, kaj novelektita urbestro de Zagrebo transprenos sian funkcion.

**Josip Pleadin** plue parolis pri la aktivecoj de ZE, la ideo pri eldonado de Etlibrasero kaj pri ciferecigo de kroataj Esperanto-periodaĵoj, kio jam komenciĝis en DEC per ciferecigo de “Konkordo” (1924-1929), danke al UZE kiu havigis por DEC la necesan plurfunkcian maŝinon (interalie por rapida skanado).

**Sreĉko Radulović** en sia diskuto menciis la mankon de kursoj, foreston de sistema edukado de aktivuloj, organizadon de komunaj programoj (ekz. festado de Nova jaro), mankon de konvenaj membrokartoj kaj regulaj kunventagoj. **Radenko Milošević** respondis ke parto el tiuj temoj jam troviĝas en la programo de UZE, kaj iom post iom oni klopodos realigi ilin.

**Vlado Jurković** proponis

ke “Zagreba Esperantisto” kaj “Tempo” unuiĝu, kaj ke ni ricevu unu komunan altkvalitan gazeton. **Josip Pleadin** respondis, ke tia ideo ne estas nova, kaj flanke de UZE povus esti akceptebla, sed KEL devus akcepti kelkajn kondiĉojn, kiujn ĝi ĝis nun neniam serioze konsideris.

**Roža Brletić-Višnjić** proponis ke oni preparu ian protokolon, fakte instrukciaron por homoj kiuj fondas novajn societojn kaj organizas ilian laboron.

**Radenko Milošević** konstatis, ke por diskuti la antaŭviditan temon pri la statuto de KEL ne restis tempo, sed proponis ke oni sendu klaran mesaĝon, ke UZE volas aktive kunlabori rilate la statutajn ŝanĝojn.

**Stjepan Žarina** konkludis, ke tiu ĉi jarkunveno estis eble komenco de tute nova aliro al niaj problemoj. Jam sufiĉis ofendaj kaj nekonvenaj vortoj skribitaj dum pluraj antaŭaj monatoj en la korespondado de la membraro, plejparte en la Estraro de KEL. Zamenhof certe ne imagis tiel la interhoman kunlaboron. Ni devas unuiĝi, ĉesi ofendi unuj la aliajn. Li ankaŭ, kiel membro de la Kontrola komitato de KEL konfirmis, ke en la gvidado de KEL okazis deliktoj, kiujn oni devas senpartie kaj kiel eble plej rapide finesplori.

**Mato Špekuljak** informis la ĉeestintojn pri la Societo por rusa lingvo kaj kulturo, kaj pri la hodiaŭ subskribita kunlaborkontrakto inter la Societo kaj UZE.

Fine de la jarkunveno, la prezidanto **Milošević** konstatis, ke oni prokrastos la diskuton pri la statuto de KEL.

La protokolo de la jarkunveno, gvidita de **Snježana Habulin**, elŝuteblas ĉe:

[http://zagreba-esperantisto.hr/index.php?option=com\\_remository&Itemid=11&func=fileinfo&id=25](http://zagreba-esperantisto.hr/index.php?option=com_remository&Itemid=11&func=fileinfo&id=25)

# JARKUNVENO DE BJELOVARA ESPERANTISTA SOCIETO

Dimanĉon, la 10-an de februaro 2013, Bjelovara Esperantista Societo okazigis sian duan regulan jarkunvenon en la ejo de Ĉeĥa komunumo. Partoprenis dudeko da membroj kaj iliaj gastoj el Ďurdevac, Kutina, Petrinja kaj Sisak, dum pluraj salutoj venis skribe. La kunvenon gvidis la societa prezidanto Franjo Forjan, kaj estis diskutitaj labora kaj financa raportoj, kaj akceptita programo por la jaro 2013. Estis konstatite, ke la Societo en tre mallonga tempo fariĝis unu el la plej aktivaj, kvankam laŭaĝe la membraro apartenas al senjora kategorio. Ĝuste plijunigo de la membraro estas elstarigita kiel la ĉefa tasko en la estonteco.

En 2012 la societo realigis sian repaĝaron en Ipernity, informis la lokan gazetaron (aperis 4 artikoloj en 2 lokaj gazetoj) kaj televidon (1 raporto), dum pri la societa laboro plurajn artikolojn publikigis "Revuo Esperanto", "La ondo de Esperanto", "Tempo"

*Josip Pleadin*



kaj aparte amplekse "Zagreba Eprantisto". En la 10-a kongreso de kroataj esperantistoj partoprenis 31 membroj de la societo, el kio du estis membroj de la Organiza kongresa komitato. En junio estis organizita tre sukcesa gastado de la brazila geedza paro Menagasso, kiuj prelegis pri "Brazilo - koninda lando" kaj estis tre amike akceptitaj de la urbestro Antun Korušec. Du membroj partoprenis la Verkistan renkontiĝon en Hraščina. La Societo bone kunlaboris kun Popola biblioteko "Petar Preradović" kaj Ĉeĥa komunumo. La ĉefa dumjara programo estis organizado de Zamenhoftaga festo kun okdedo da

partoprenintoj kaj pluraj programeroj, inkluzive de tri ekspozicioj.

Por 2013 la Societo akceptis ampleksan programon, el kiu ni elstarigu la centran manifestacion "Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo" (en septembro, okaze de Tago de la urbo). La societo intencas organizi ekspozicion de korea pentristo-esperantisto Ho Song, gastigi la hungaran orkestron el Muziklernejo el la urbo Erd, organizi komunan festadon de Zamenhofa tago kun DEC el Ďurdevac kaj Esperanto-societo "Estonteco" el Križevci, establi rilatojn kun esperantistoj en urboj kaj regionoj kun kiuj Bjelovar kaj ĝia departemento kunlaboras. Gravan atenton oni volas doni al kunlaboro kun aliaj urbaj societoj, kun Esperanto-societoj enlande kaj eksterlande, el kio oni aparte akcentis renovigon de kunlaboro kun societoj kun kiuj bjelovaranoj dum antaŭaj jardekoj intense kunlaboris: Petrinja en Kroatio kaj Prilep en Makedonio. Ili volas intensigi esploron de la Esperanta historio en Bjelovar, aparte kunlabore kun Dokumenta Esperanto-Centro en Ďurdevac, celante publikigi tiuteman monografion. Pluraj membroj jam engaĝiĝis en komuna tradukprojekto de la verko de Tibor Sekelj "De Patagonio ĝis Alasko". La estraro volas motivigi siajn membrojn pri perfektigo de sia lingvoscio, pri verkado de artikoloj por diversaj gazetoj. Ili volas organizite viziti esperantistojn de Kapošvar en Hungario kaj la 11-an kongreson de kroataj esperantistoj se ĝi okazos.

La plej granda problemo estas manko de propra societejo, kaj tio devas fariĝi unu el la plej gravaj punktoj de la programo en 2013.






# KIA ESTUS LA NUNTEMPA MONDO SEN NIKOLA TESLA

 Radenko Milošević

La esenco de la titola demando postulas la respondon, ke sen Nikola Tesla (1856-1943) la mondo estus tute alia: sen interreto, televido, elektra lumo kaj elektra energio. Sen liaj inventaĵoj, aŭ "eltrovaĵoj", kiel li mem nomis ilin, neniu povus imagi la evoluon de la mondo. Li estis viziulo, kiun nuntempaj fizikistoj klopodas studi kaj kompreni liajn grandegajn ideojn. Lia aserto, ke la universo estas kunligo de spirito kaj materio estis tre klara. Oni eĉ supozas, ke Tesla povus per siaj sciencaj verkoj senprobleme renversi la teorion de relativeco de Albert Einstein, ĉar Tesla asertis ke ekzistas konstanta nuneco, kaj la tempo estas natura fenomeno kiu influas la spacon kaj la materion.

Nikola Tesla estis specifa fenomeno en la scienca mondo. La inventaĵoj de Tesla estas konsiderataj parto de la t.n. "Dua industria revolucio" en la mondo, per kiu grave ŝanĝiĝis nia ĉiutagaĵo. Nikola Tesla estas unu el la plej grandaj inventistoj de la 20-a jarcento. Liaj inventaĵoj en la kampo de elektrotekniko kaj malkovroj en fiziko, lasis profundan spuron ne nur en la tutmonda scienco, sed ilia aplikado reflektiĝis ankaŭ al plibonigo de vivkvalito en la 20-a jarcento.




Nuntempe Tesla estas konsiderata unu el la plej fruktodonaj geniuloj en elektrotekniko. Lia granda merito estas enkonduko de alterna kurento en vastan uzadon. La inventaĵoj de Tesla bazitaj sur la alterna kurento fariĝis fundamentaj por kompleta pluevoluo de elektrokaj radiotekniko. Li realigis ĉirkaŭ mil inventaĵojn kaj patentojn, ekzemple la trifazan sistemon por transmisio de elektra forto, generatoron kaj transformatoron por altfrekvencaj kurentoj (la kurentoj de Tesla) ktp. Li inventis la rotacian magnetkampon kaj plurfazan sistemon de alterna kurento.

Li estis unu el la pioniroj de radiotekniko: li malkovris sistemon de sendrata direktado kaj distanca signosendado, malkovris novan sistemon de iluminado, konstruis altfrekvencajn alternatorojn kiel bazon de elsendaj radio-stacioj, produktis nesufokitajn elektromagnetajn ondojn, malkovris kaj patentigis la principon de resonanco por radio-konektoj, prezentis la ideon pri interplaneda telekomunikado helpe de ultrakurtaj ondoj, kaj kiel tutaĵon li imagis la radaran sistemon. Menciis ĉiujn liajn atingaĵojn kaj inventaĵojn, postulus tro multan spacon, kaj liaj nerealitaj ideoj kiuj restis skizitaj, daŭre kaŝas multajn sekretojn.

Fine de la 19-a jarcento Tesla inventis elektromagnetan motoron, kiu estas fundamenta por ĉiuj maŝinoj movantaj sin per alterna kurento, kaj post realigo de patento de plurfaza sistemo de alterne moviĝanta dinamo, transformatoro kaj motoro, malfermiĝis lia konflikto kun Thomas Alva Edison. Tesla kunlabore kaj subtene de Georg Westinghous venkis en tiu konflikto per sia alterna modelo. Tesla en 1891 inventis dratvolvaĵon, kiu fariĝis indukcia dratvolvaĵo plej ofte uzata en radio-teknologio. En 1893, en la ekspozicio Expo en Ĉikago, starigo de lumiga sistemo estis komisiita al Tesla, kaj iom pli poste al li estis komisiita ankaŭ konstruado de hidroelektra produktaĵo sur akvofaloj de Niagaro. Samtempe kun tio, li okupiĝis pri aliaj inventaĵoj, kiaj estas sendrata transmisio de elektra energio kaj radia direktado de flugmaŝinoj. Li inventis praformon de radaro, ekspluatadon de sunenergio, radian komunikadon kun aliaj planedoj ktp. En la komenco de la 20-a jarcento Tesla faris unu el siaj plej grandaj malkovroj: starantaj ondojn. Helpe de tiu malkovro li pruvigis, ke la Tero povas servi kiel konduktaĵo kaj povas reagi kiel muzika forko pro elektraj vibradoj en difinita frekvenco. Tiamaniere li lumigis 200 ampolojn neligitajn perdrate, je distanco de 40 kilometroj, el kiu ĉiu unuope lumigis la cirkon de 31 metroj ĉirkaŭe.



*La naskiĝdomo de Nikola Tesla en Smiljan (nuntempe muzeo) kun monumento al la granda sciencisto*



### Unu el la patentoj de Tesla

Ĉiam estas ripetende, ke Tesla mem asertis, ke li ne estas inventisto, sed "malkovranto de la fenomenoj kiuj jam ekzistas ĉirkaŭ ni en la naturo". Tesla ja estis strangulo kiu perlaboris nenion per siaj inventoj, kaj estas preskaŭ atendita lia decido, ke en 1912 li rifuzu akcepti la Nobel-premion por fiziko, dirinte "ke oni atribuu tiun honoron al homoj kiuj forŝtelis liajn inventojn". En tio ankaŭ kuŝas lia starpunkto, ke li ne estas fizikisto, sed inventisto kaj konstruisto.

Multaj liaj asertoj estis primokitaj kaj kritikitaj kiel nepruvitaĵoj. Li asertis ke li komunikis kun aliaj planedoj, kaj lia ideo pri "mortigaj radioj" kiuj povas detruu dek mil aviadilojn je distanco de 400 kilometroj estis travivinta la saman neglekton. Kun identa indigno oni komentis lian deklaron, ke li povas duonigi la terglobon kiel pomon.

Tesla pretendis, ke li inventis la radian komunikadon, kaj kontestis la prioritaton de Guglielmo Marconi. Rezulte de tio en 1943 la tribunalo decidis doni la patentan rajton al Tesla.

Tesla estis sekreta homo, kio kaŭzis fantaziajn onidirojn pri sia laboro. Nelonge antaŭ sia morto li laboris pri teleefika batalilo, nomata "mortigaj radioj", kiun li proponis al la usona defenda ministerio, sed detaloj ne estas konataj.

Nikola Tesla, la kroatia inventisto, fizikisto kaj elektro-

inĝeniero estis naskita la 10-an de julio 1856 en la vilaĝo Smiljan apud la urbo Gospić en Kroatio, tiutempe parto de Aŭstra imperio.

Laŭ la vortoj de Tesla mem, lia familio pli frue nomiĝis Draganić. Rilate al lia familia nomo ekzistas du supozoj. Unu sian apogon trovas en la hipotezo, ke la familia nomo "Tesla" originas el la nomo de la romia setlejo *Tesleum*, sed la alia aserto estas ke unu familia branĉo ricevis la kromnomon Tesla pro tio, ĉar herede ĉiuj familianoj havis antaŭen elstarantajn dentojn, kiuj similis specialan ilon por prilabori lignaĵon (kroatlingve "tesla"). Pro liaj ortodoksaj parencoj kaj gepatroj oni taksis lin Serbo, sed lastempe, post esplorzultoj de profesorino Ljubica Štefan, aperis la tezoj pri liaj supozeblaj kroataj originoj. Tesla mem konfirmis en sia taglibro, ke lia avo ricevis la kromnomon pro siaj elstarantaj dentoj. Li skribis en sia taglibro: "Mi ĝojas, ke ankaŭ Kroatoj prenas min kiel sian, ĉar ni ja estas samlandanoj. Nome, miaj prauloj estis kroatoj Draganići el Zadar, kiuj kiel kroataj nobeloj en la 16-a jarcento venis en la regionon de Lika. La prauloj de mia patrino estis ankaŭ kroatoj devenantaj el Novi Vinodolski. Mia praavo laŭ iuj asertoj foriris al la t.n. turka Kroatio (Bosnia regiono) kaj edzinigis tie la ortodoksan fraŭlinon kaj samtempe mem transiris al ortodoksa konfeso." Al la tezo pri kroateco de Tesla kontraŭstaras kelkiuj internaciaj kaj kroatiaj profesiuloj, kiuj parolas pri lia serba aparteno.

Tesla ekfrekventis la bazan lernejon en Smiljan kaj finis ĝin en la proksima Gospić, kaj la realan gimnazion li finis en Rakovac apud la urbo Karlovac. Du jarojn post la finita gimnazio li faris paŭzon, sed pli poste li studis teknikajn sciencojn en Graz kaj teknikon en Prago.

Tesla en sia vivo estis ĉiam tre ligita al sia hejmlando, pro kio la unuajn patentojn antaŭ ol li ricevis la usonan ŝtatanecan, li komencadis per la vortoj: "Oni sciu, ke mi Nikola Tesla el Smiljan en Lika, la limregiono de Aŭstria-Hungario, inventis...".

Ĉe la fino de tiu ĉi teksto pri la grandega inventisto, eble eĉ la plej granda de ĉiuj tempoj, menciendas, ke la "Encyclopaedia

Britanica" envicigis lin inter la dek plej elstaraj personoj en la monda historio. De 1892 ĝis 1894 li estis vicprezidanto de la Usona Instituto de Elektraj Inĝenieroj. En la jaro 1896 li estis elektita kiel honormembro de Kroatia akademio pri sciencoj kaj artoj (tiutempe: Jugoslavia akademio – JAZU) kaj en 1926 li estis titolita honora doktoro de la Universitato en Zagrebo. Okaze de la centjariĝo de lia naskiĝo, la Internacia elektrokomisiono donis la nomon teslo (T) al la unuo de magneta indukcio, kaj tiel Tesla ricevis sian lokon en la internacia sistemo de mezurunuoj.

Dum la vivo de Tesla ĉiam diskoniĝis neklaraj kaj nekonataj faktoj kaj eventoj. Eĉ post lia morto la situacio ne kvietigis. Post lia morto agentoj de la usona FBI (Federal Bureau of Investigation = Federacia buroo de esplorado) traserĉis liajn postlasaĵojn, serĉante ian ajn materialon pri la specialaj mortigaj kaj detruaj radioj. Iuj vivhistoriistoj de Tesla konkludis, ke granda parto de nepublikigitaj manuskriptoj kaj patentoj de Tesla fariĝis ŝtata sekreto de Usono.

La cetera parto de lia postlasaĵo, kiu laŭ lia decido devis esti sendita al lia malnova hejmlando (respektive Aŭstria-Hungara Monarkio, aŭ pli precize Kroatio), estis sendita al Beogrado. Tiu parto ne estas tute klara, ĉar nenie estis notite kion li celis insistante, ke la manuskriptoj estu senditaj al la lando kie li estis naskita. Laŭ la atesto de la skulptisto Ivan Meštrović, Tesla diris, ke li ne volas ke lia statuo estu sendita al Beogrado, sekve Meštrović insistis ke la statuo sian lokon trovu en la Instituto „Ruder Bošković“ en Zagrebo. Ekde 2006 ĝi troviĝas ĉe la kruciĝo de stratoj de P. Preradović kaj T. Masaryk en Zagrebo.

### Literaturo:

Tesla, Nikola: *Moji pronalasci. (Miaj inventaĵoj)*, Ŝkolska knjiga, Zagrebo, 1990.

Supek, Ivan: *Povijest fizike (Historio de fiziko)*, Ŝkolska knjiga, Zagrebo, 1990.

\*\*\*: *HRVATSKA ENCIKLOPEDIJA (KROATIA ENCIKLOPEDIJO)*, n-ro 10, Leksikografski zavod "Miroslav Krleža", Zagrebo, 2008.

# JARKUNVENO DE KEL: Radenko Milošević

## VENKO DE DEMOKRATIO?

Kial ne surprizis min la rezultoj de la jarkunveno de Kroata Esperanto-Ligo (KEL) okazinta la 8-an de junio? Ĉar ĝi estas jam la kvara aŭ kvina jarkunveno kiu alportis nur malkonkordon.

Kio ja estas la ĉefa problemo, se ni ĉiuj laboras por la sama afero, por Esperanto? Unuflanke la netuŝebleco de parto de la Estraro (=Upravno vijeće), kiu jam delonge arogas konsideri sin organo pli supera ol la asembleo. Ĝi fariĝis aŭtokrata reganto, kiu sian povon konservas nur pro la pasiveco de plejparto de la membraro!

Neniu sin demandis kial eĉ kvar membroj de tiu sama Estraro ne konsentas kun ĝia laboro, kaj ke proteste ili ne volas venadi al ĝiaj kunsidoj. La vero kuŝas en foresto de sana dialogo, diktado de solvoj prezentataj kiel la solaj eblaj kaj utilaj, kaj la ofenda korespondado kiu dum pasintaj jaroj cirkulis ene kaj ekstere de tiu organo.

Neniun interesas ĉu estas vero en la vortoj de la "komplotintoj" kiuj sin mem nomis opoziciuloj. Ĉu entute iu legis la tekston kiun la t.n. opoziciuloj disdonis al la asembleanoj antaŭ la jarkunveno? Verŝajne ne! Ĉu iu legis la protokolon, kiu estas manka kaj falsa samkiel ĉiuj ĝisnunaj?

Kial neniun interesas la aserto de la t.n. opozicio, ke la aĉeto de la ejo en Vodnikova tro multe kostis, ke oni ne scias ĝian veran prezon, ke la aĉeto kaŭzis multjaran ŝuldiĝon de KEL, kaj ke la kosto de Vodnikova ne estas mezurebla nur per mono, sed ankaŭ per malboniĝintaj rilatoj en KEL, neglektado, stagnado, perdo de membroj kaj polusiĝo de la membraro je du tendaroj?

Kial neniun interesas ke en la Estraro sidas homoj kun evidenta konflikto de interesoj: tiuj samaj kiuj pruntis la monon kaj subskribis kontraktojn sen scio de la asembleo, kiuj ricevas interezojn kaj mem decidas pri repago de sia prunto kaj pri la sorto de KEL?

Kial neniun interesas la financoj de la t.n. Eŭropa projekto, pruntoj de Nedeljko Korasić aŭ de la neniame ekzistinta Fondajo Trixini? Kial silente oni permesis ke la neekzistanta Fondajo Trixini cedu sian prunton al novfondita Esperanto-societo Trixini? Kial estas subskribita nova pruntokontrakto por sekvaj 12 jaroj, kaj, finfine, kial neniun zorgigas, ke tion faris la aktualaj prezidantino kaj sekretariino, samtempe membrinoj de la Estraro, kiu pri tiuj samaj pruntoj decidas repagon?

Kial neniun volas scii, kiom da mono vere kostis la aĉeto de Vodnikova?

La politiko de la Estraro

(same kiel la konsisto de tiu organo) estas kreita en la kapo de la vicprezidanto de KEL Vjeloslav Morankić, kiu bazas ĝin sur la ideo pri "trusto de kapabluloj". Ĉu vere nur tiu manpleno da membroj kapablas ion fari, kaj ĉu vere ilia laboro estas la sola valoro kaj kompetenta? Ĉu oni povas akcepti la opinion ke, se ni ne estus farintaj tiel, ni neniame atingus tion kion ni atingis, eldiritaj de la prezidanto de la Kontrola komitato, kiu ja devus tiajn aferojn malebligigi? Kaj kion ni efektive atingis? Ni atingis abismon sur kies randoj ni staras kaj rigardas kiel disfalas la iam forta movado! Eble post la laste okazinta jarkunveno la aferoj al iuj el ni aspektas pli bone, sed ni devos trapasi ankoraŭ longan kalvarian vojon antaŭ ol ni reakiros la konkordon kaj repagos niajn ŝuldojn. Malebligos kaj malfaciligos tion amaso da malveroj eldiritaj kaj skribitaj. Unu el la plej drastaj estas la aserto, ke la t.n. opozicio volas



La jarkunveno de KEL okazinta la 8-an de junio 2013



ŝanĝi la Estraron, elektigi la novan, vendi la ejon en Vodnikova kaj inter si disdividi la monon! Ĝi estas malbonintenca kaj malvera, ĉar la opozicio ĉiam porparolis tujan repagon de kreditoj (ĉar ni povis fari tion post vendo de nia posedaĵo en Velika Gorica). La t.n. opozicio multfoje invitis al interkonsenta solvado de problemoj (vidu la konkludojn de la kunveno de societaj reprezentantoj okazintaj en Bjelovar kaj Sisak, aŭ tiujn de la jarkunveno de UZE - kelkajn el ili ni publikigas en ĉi tiu numero).

Ne mirigas min la rezulto de la jarkunveno, ĉar ne la unuan fojon la flegmeca kaj pasiveca amaso venkis la aktivajn agantojn. Ĝi ne mirigas min, ĉar plejparto de la membraro eĉ ne scias klare la fundamenton de ĉi tiu konflikto, nek tio interesas ĝin. Oni ne venis en Esperantujon por politike batali, sed por okupiĝi pri sia "dua plej grava afero".

La rezultoj ne mirigas min, ĉar la gvidantoj de KEL preparis ĉion por ke la rezultoj estu ĝuste tiaj: ili malfondis la plej fortan E-societon "Bude Borjan", sed antaŭ tio transdonis ĝian monon al KEL (ĉu vi memoras vendon de la garaĝo posedita de "Bude Borjan"?). Ne miru, ĉar la gvidajn poziciojn en "Bude Borjan" havis la sekretariino de KEL kaj la prezidanto de la Kontrola komitato de KEL, kiu samtempe estis likvidanto de la societo "Bude Borjan"! Ne miru tial ke la Kontrola komitato povis senĝene labori nur dum la malsano de sia prezidanto, kaj ke tiam ĝi pruvis per faktoj tion kion la t.n. opozicio ĉiam asertis: Ekzistas kontraktoj pri kiuj ne sciis la asembleo, kaj ekzistas konflikto de interesoj, senkonsidere kiel tio estis mildigita per vortoj! La Estraro, anstataŭ plifortigi la societajn, invitis la membraron ekŝigi el la membreco en siaj lokaj societoj kaj fariĝi individuaj membroj de KEL, nur por ricevi kiel eble pli da reprezentantoj en la asembleo, kiuj daŭre subtenos la ĝisnunan labormanieron.

En la jarkunveno okazinta la 8-an de junio do ŝajne venkis la demokratio! Mi diras "ŝajne", ĉar evidente plejmulto el la asembleanoj estis silentuloj kiuj levis sian manon por decidoj anticipe skizitaj de la Estrara plimulto, entute ne pripensinte la asertojn de la t.n. opozicio. La demokratio estas morta - vivu la demokratio!

Ĉu venkis la vero? Absolute ne! Venkis via pasiveco, estimataj asembleanoj. Mi komprenas ke la rezultoj de via voĉdonado celis konservi la unuecon de KEL, sed "la vojo al infero estas sternita per bonaj intencoj", kaj la komunan organizaĵon vi duonigis kiel putran pomon. Tiel eĉ senkonscie vi akceptis ankaŭ la respondecon por (malbonaj) okazantaĵoj en la estonteco. Suferos pro via decido ne nur KEL, sed ankaŭ Esperanto en Kroatio!

Miaflanke sufiĉas! Mi lavas la manojn!

## EN POTEMKINA KARNAVALO

En regno Potemkina okazu karnavalo!  
Ĉiu ŝafo sin vestu blanke en tiu horo!  
Potemkinujo estu granda feliĉa valo!  
Gaja popolo marŝu en Tago de la Gloro!

(Dekretite en dua tagdeko de junio,  
ordone ekspedita per speciala poŝto  
el kabineto de ŝia altestimata Moŝto,  
diplome distingita reĝino Kalumnio.)

En tago karnavala kolektiĝas maskitoj.  
Jubilas civitanoj en benita nescio.  
Vorto-ĵonglistoj flatas, silentas elektitoj.  
Sur trono pave flirtas, moŝtino Kalumnio.

Honorpostena ŝafo - paĝio piprograjna -  
apud ŝiaj piedoj, tute blankfelumita.  
Civitanoj huraas pro parolad' vortfajna,  
konforme al ordono - blanke uniformitaj.

El maro civitana elstaras nigra ŝafo,  
en verda karnavalo solece nemaskita.  
Hereze ĝi kriadas, sed jenas paragrafo!  
Per silenta verdikto ĝi estas klaĉbuĉita!

Reĝino Kalumnio, kiel vera bigoto,  
mielon disdonas kaj tortojn el ĉokolado.  
Sed vanas tia dolĉo, el buŝo venas koto!  
Foriras nigra ŝafo - jen fino de balado!

Meze de verda parko la ŝafo libere spiras.  
En regno Potemkina pludaŭras granda bruoj.  
Blankaj ŝafoj fasadojn kolorajn preteriras.  
Nenie nigra ŝafo! Kia moralinstruo?

(N.Ŝ.)

# PLUKRESKO KAJ BONAJ DECIDOJ

*Josip Pleadin*



*Franjo Šlabek*

Dokumenta Esperanto-Centro plukreskas dank' al preskaŭ ĉiutagaj riĉigoj de sia materialo. Fondita en 2010, ekde 2011 ĝi estas registrita en la Jarlibro de UEA kiel unu el pli gravaj kolektoj. Ĉi-jare en la Jarlibro ĝi menciigas ankaŭ kiel Loka grupo. Por ne paroli pri multaj aktivecoj de DEC, ni menciui nur la aktuale okazantajn ciferecigon de la gazeto "Konkordo", bibliografiadon de "Tempo" kaj skanadon de artikoloj de/pri Tibor Sekelj por ĉinaj esperantistoj, kiuj celas eldoni libron pri li.

En 2011 DEC ricevis la Subvencion Cigno de UEA (disponigita de japana industriisto Etsuo Miyoshi), kio motivigis ankaŭ plurajn aliajn esperantistojn finance subteni ĝin. DEC daŭre bezonas vian financan subtenon por evolui kaj efektivi siajn projektojn, sed konsideru ankaŭ la eblecon kontribui per Esperantaj materialoj. Eble la ĉi-suba ekzemplo efikas motive.

Antaŭ la fondo de DEC, en Kroatio estas registritaj sennombraj perdoj de kolektoj de forpasintaj samideanoj kaj malfonditaj societoj. Per ĝia fondo la kolektado de tia materialo fariĝis sistema proceso.

Sed mi devas aparte elstarigi la eventon kiu okazis en julio ĉi-jare, ĉar ĝi estas novaĵo en la pensado de niaj esperantistoj.

S-ino Darinka Šlabek el Zagrebo telefone informis min, ke la konata esperantista kaj fervojista aktivulo, ŝia forpasinta edzo Franjo, postlasis al DEC sian kompletan bibliotekon. Li klarvide klopodis ankoraŭ dumvive senigi sian familion de la respondeco pri lia Esperanta heredaĵo! Ĉu li konis la konsilon de Biblioteko Butler ke oni "decidu pri sia Esperanta biblioteko kiam oni povas, ĉar poste pri ĝi

devos decidi la aliaj"? Familianoj de forpasintaj samideanoj simple ne scias kion fari, nek povas taksii la valoron de tia materialo, kaj ĝi nemalofte fariĝas forĵetenda rubaĵo.

Tial la decido de Franjo Šlabek trovi sekuran lokon por sia biblioteko, kaj la decido de lia vidvino plenumi ĝin, estas plurmaniere precedenca.

La 25-an de julio mi transprenis la postlasaĵon en la loĝejo de familio Šlabek en Zagrebo, Racinova 1. La vera valoro de tiu materialo povis esti konata nur post malpako de la transprenitaj skatoloj. Per supraj kontrolo kaj nombrado estas konstatite, ke la donacita materialo enhavas ĉirkaŭ 230 librojn, 80 numerojn de diversaj gazetoj, dudekon da diversaj diplomoj kaj iom da alia materialo, inkluzive la manskribitajn Esperantajn poemoj verkitajn de Franjo Šlabek.

La decido de s-ino Darinka Šlabek estas eĉ pli grava,

ĉar ĝin imitis ankaŭ la decido de samideano Branko Repac el Zagrebo, kiu ankaŭ aldonis tridekon da libroj, kvindek da gazetnumeroj kaj aliajn materialojn el sia kolekto. Tiel la 25-an de julio ankaŭ lia materialo estis transprenita en Zagrebo.

Se ankaŭ vi, karaj legantoj, disponas pri Esperanta materialo, mi volas informi vin pri la ebleco kvalite prizorgi ĝin en DEC. Mi akcentas ankaŭ, ke "Esperanta materialo" ne estas nur libroj,



*La libroj el la biblioteko de Franjo Šlabek post malpako.*

# SOCIETAJ REPRESENTANTOJ RENKONTIĜIS EN SISAK Redakcia kompilo

La 2-an de marto 2013 en Sisak, invititaj de la tiea Esperanto-societo, renkontiĝis reprezentantoj de 6 kroataj Esperanto-societoj en sia dua kunveno, por diskuti la proponitajn ŝanĝojn de la Statuto de Kroata Esperanto-Ligo, sed ankaŭ por pritrakti multajn akumulitajn problemojn de la landa asocio. La kunvenon partoprenis Marija Jerković (Unuiĝo de prelegantoj de Esperanto - UPE, Zagreb), Nenad Margetić (Bjelovara esperantista societo), Radenko Milošević (Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj - UZE), Josip Pleadin (Dokumenta Esperanto-Centro - DEC, Đurđevac), Zdenka Polašek (Bjelovara esperantista societo), Srećko Radulović (Esperanto-societo "Sisak"), Stjepan Žarina (Esperanto-societo "Mondo paca", Velika Gorica) kaj Anto Mlinar (prezidanto de Kontrolkomitato de Kroata Esperanto-Ligo el Zagrebo). La kunveno pasis en

sed multe pli valoras periodaĵoj (gazetoj) kaj aliaj dokumentoj (fotoj, leteroj, filmoj kaj sonaĵoj).

La iama estrarano de UEA Ranieri Clerici skribis en la retlisto de UEA-membroj en oktobre 2011, jene : "... estas la demando pri kiom da landoj disponas centron kiel DEC, kiu ne nur kolektas memoraĵojn, sed ankaŭ informas pri ĉiu akiraĵo, tiel instigante la homojn konservi kaj havigi la dokumentojn". Ĉu ni instigis ankaŭ vin?

**Kontaktadreso:**  
[dec.kroatio@gmail.com](mailto:dec.kroatio@gmail.com)

agrabla atmosfero, kvankam oni tuŝis ankaŭ malagrablajn temojn. La kunvenintoj konkludis:

1) *Ili subtenas ĉiujn proponojn por ŝanĝi la Statuton de Kroata Esperanto-Ligo (KEL). De la Estraro de KEL ili postulas, ke ĝi kompilu proponon de ŝanĝoj kaj sendu ĝin al la asembleo por akcepto, sed ili postulas ke la Estraro preparu ankaŭ aldonan materialon eksplikante pro kio iujn ŝanĝoproponojn ĝi malakceptas, pri kio la asembleo ankaŭ rajtu diskuti kaj eventuale malakcepti la opinion de la Estraro.*

2) *Ili konfirmas la konkludon de la unua kunveno okazinta pasintjare en Bjelovar, kiu kontraŭas ofendojn. Ili invitas la membraron ne legi, ne disvastigi kaj ne respondadi retmesaĝojn kun*

*tia enhavo, kaj en kazo de sekvaj tiaj ekzemploj tuj kaj senpartie sankcii la uzantojn de tiaj rimedoj.*

3) *Ili invitas la Estraron, cele al plibonigo de la rilatoj, akcepti dialogon kun la parto de la membraro nekontenta pri la laboro de la Estraro. Ili invitas la Estraron mem organizi kunvenon dum kiu oni egalrajte kaj en demokrata tono, ĝuste tiel kiel dum la dua kunveno de societaj reprezentantoj en Sisak, diskutu pri la kurantaj problemoj kiuj malfaciligas la nuntempajn interrilatojn en la Ligo, kaj tiamaniere akiru la unuecon nepre bezonatan en la aktuala ekonomie malfacila tempo, aparte sojle de nia invito organizi Universalan Kongreson de Esperanto en Kroatio dum unu el sekvaj jaroj.*



**Forumo de kroataj esperantistoj:**  
<http://zagreba-esperantisto.hr/forum/index.php>



# PADMA, LA ETA DANCISTINO

(fragmento)

 Tibor Sekelj

*Kun aparta permeso de s-ino Erzsébet Székely, ni publikigas parton de la 3-a ĉapitro "Bunta printempo" el la ĵus aperinta porinfana libro de Tibor Sekelj "Padma, la eta dancistino", originale verkita en Esperanto.*

La dancistino estis vere bela, kiel Padma atendis. Komprenoble, la bunta vestaĵo kaj la ŝminko sur la vizaĝo elstarigis eĉ pli ŝian belecon, kaj ankaŭ ŝiajn movojn. Ŝia bluzo havis fajre ruĝan koloron, kaj la etaj pecoj de spegulo fiksitaj al ĝi rebrilis ĉe ĉiu ŝia movo. Sub la larĝa jupo el flava silko, ĉirkaŭ la maleoloj ŝi havis rimenojn kun vicoj da tintiloj. Ili harmonie tintadis je ĉiu ŝia paŝo. Ĉirkaŭ la maleoloj ŝi havis ankaŭ du pezajn arĝentajn ringojn. La fingroj de ŝiaj manoj kaj piedoj estis ornamitaj per arĝentaj ringoj. Abundis sur ŝi la diverskoloraj brakringoj, kolĉenoj, ornamoj pendantaj de la nazo kaj la oreloj, kaj sur ŝia frunto pendis ora medaliono.

Tia ŝi aperis en la rondo de spektantoj kiuj senpacience atendis ŝian alvenon. La plej internaj rondoj sidis surtere, aliaj genuis aŭ staris en la plej ekstera vico.

Antaŭ ol komenci la dancadon, ŝi salutis la spektantojn kun la manoj kunigitaj antaŭ la vizaĝo, kaj tiel staris iun tempon, murmurante iun preĝon dediĉitan al la dioj.

Ŝi ekmoviĝis per leĝeraj dancmovoj, sekvante la ritmon de la muziko. Kaj iom post iom, kiel la muziko vigliĝis, ankaŭ ŝiaj movoj fariĝis pli kaj pli viglaj. Ŝiaj ruĝe kolorigitaj piedoj faris rapidajn saltojn kaj saltetojn, donante ritmon al la danco per la tintiloj. En certaj momentoj ŝi tiel lerte kaj elaste kurbiĝadis, kvazaŭ ŝi ne havus dorsan spinon. Ŝi dancis per ĉiu parteto de sia korpo. Ŝiaj okuloj dancadis por si mem, kaj aparte la



 Tihomir Lovrić

manoj, la ŝultroj, la brovoj, lipoj kaj ĉio sur ŝi estis samtempe en intensa movo. La plej bela el ĉio estis la movoj de ŝiaj manoj. En iu momento ili aspektis kiel birdoj kiuj volas ekflugi ... Tuj poste ili transformiĝis en cervon kiu trinkas akvon ĉe fonto, aŭ eble foliaro tremanta je venteto.

De tempo al tempo onklo Bend ĵetis rigardon al Padma. Ŝia senmova emociigita rigardo klare montris ke ŝi estas ĉarmita de la dancistino kaj ŝia danco, kaj ke ŝi

estus feliĉega se iun tagon ŝi mem kapablus tiel danci.

Kiam la danco finiĝis, la muzikistoj disiris inter la ĉeestantoj por kolekti monerojn kiel premion pro ilia laboro kaj la ĝuo kiun ili donis al la vilaĝanoj. La viroj kaj virinoj kun suĉinfanoj komencis disiri, kaj restis ĉefe nur geknaboj kiuj scivoleme observadis la dancistinon kaj ankaŭ la muzikinstrumentojn. Ankaŭ Padma estis inter ili. Ŝi atente observis la dancistinon, kvazaŭ la danco ankoraŭ daŭrus, per larĝe malfermitaj, admirantaj okuloj.

– Ĉu ŝi plaĉas al vi? – demandis onklo Bend.

Padma silente kapjesis.

– Ĉu vi ŝatus lerni kelkajn dancmovojn de ŝi?

Padma denove nur kapjesis, sed kun sufiĉe da entuziasmo.

Onklo Bend tiam aliris al la dancistino kaj ion diris al ŝi, montrante per la okuloj en la direkto de Padma. Li donis ion al la dancistino, sed neniu povis vidi kion. Kvankam la dancistino certe estis laca, ŝi alvokis Padma per mansigno.

– Knabino, ĉu vi ŝatus danci kiel mi? Venu ĉi tien.

Padma embarasita staris apud ŝi, ne sciante kion ŝi devas fari nek kiel kondukti apud la dancistino.

– Faru unue tian paŝon kiel mi nun. Jen, tiel ... !

Padma heziteme kaj iom mallerte faris ĉiun paŝon kiun la dancistino montris al ŝi.


– Tre bone, – kuraĝiĝis ŝin la dancistino. Nun provu sola. Per la manoj faru jenajn movojn ...

nun la kapo moviĝu tiel. Bonege. Nun provu samtempe per la piedoj, la manoj kaj la kapo ... tiel, jen ĝuste tiel ...

Padma iom post iom liberiĝis de la embaraso, kaj klopodis ripeti la paŝojn kaj la movojn laŭeble akurate.

Onklo Bend flankstarante kun plezuro observis kiel almenaŭ parte komencas realiĝi la revo de lia amikino. Ŝi nun lernis danci de vera dancistino, kiun ŝi persone ekkonis, kaj pri kiaj ĝis tiam ŝi nur en rakontoj aŭdis. Tiu ĉi estis tute malsama


de la dancistinoj el la rakonto: ŝi estis vera, vivanta dancistino. Estas vero ke ŝi ne flugis, kiel tiuj el la rakontoj, sed ŝi turniĝadis kaj saltadis per magia forto. Padma povis ŝin tuŝi, kaj je tuŝo ŝi sentis la varmon de ŝia malhelbruna haŭto, kaj ŝi povis vidi kiel de ŝia frunto ruliĝas grandaj perloj de ŝvito. Ĉio ĉi plezurigis Padma, ĉar nun ŝi sciis ke tio, kio kun ŝi okazas estas realeco, kaj ne sonĝo kiel ĉiam ĝis nun. Ŝi sciis ke post tio ĉi ne estos vekiĝo kaj seniluziĝo, kiel ĝis nun ĉiam okazadis.



## Aperis Bibliografio de "Zagreba Esperantisto"

*Radenko Milošević*

Post la apero de la jubilea 20-a numero de "Zagreba Esperantisto", Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE), mendis kompiladon de bibliografio de artikoloj aperintaj en la unuaj dudek numeroj de sia gazeto. La kompiladon dum januaro realigis Josip Pleadin, kaj ĝi aperis ĉe UZE kiel aparta 32-paĝa broŝuro "Bibliografio de artikoloj aperintaj en Zagreba Esperantisto" (ISBN 978-953-55418-1-3). Tiu broŝuro estas la unua presajo produktita per la maŝino per kiu UZE ekipis Dokumentan Esperanto-Centron en Đurđevac. La Bibliografio estas aĉetebla ĉe UZE (*zagreba.esperantisto@gmail.com*) aŭ DEC (*dec.kroatio@gmail.com*).



## Zdravko Seleš premiita ĉe "Impeto"

*Josip Pleadin*

La eldonejo "Impeto" en Rusio en 2012 organizis konkurson pri literaturaj recenzoj. Post du-etapa voĉdonado, la organizanto anoncis la premiitojn. La unua premio estas aljuĝita al Vladimir Opletajev pro la recenzo "Ne nur lecionoj", la dua premio al Jorge Camacho pro la recenzo "Malpretertempe", kaj la tria al kroatino Zdravko Seleš el Đurđevac pro la recenzo "Nova realismo de Mikaelo Bronŝtejn aŭ Eta traktato pri leganto". Gratulojn!



# Esperanto - ponto inter Kroatio kaj Rusio

*✍* Mato Ŝpekuljak

Karaj kroataj esperantistoj, interesiĝantaj pri Rusio kaj rusia Esperanto-movado, samkiel rusiaj esperantistoj, interesiĝantaj pri Kroatio kaj kroatia Esperanto-movado, koran bonvenon al Esperanto-sekcio de la kroatia Societo pri la rusa lingvo kaj kulturo kaj al ĝia retejo <http://www.ruskijezik.info/esperanto/> ! La kroatia Societo pri la rusa lingvo kaj kulturo elkreskis el Ligo Humanitas - kroatia humanista asocio - dank' al (en jaro 2010) starigita intensa kunlaboro kun Rusia humanista societo.

Ligo Humanitas (kies radikol eliras el internacia hilelista-homaranista Esperanto-renkontiĝo en la jaro 2001 dum la UK en Zagrebo) ne plu ekzistas, ĝi estis fine de la jaro 2010 malfondita, pli precize - transformiĝinta en la kroatian Societon pri la rusa lingvo kaj kulturo, sed ĝi dum jaroj estis aktiva krom en la kroata lingvo, ankaŭ en lingvo Esperanto per sia Portalo Humanitas. Tial en nia transformiĝinta retejo oni trovos multe da malnova materialo de universalhumanisma karaktero el antaŭaj periodoj de ĉi tiu projekto.

Komence de la jaro 2012 la kroatia Societo pri la rusa lingvo kaj kulturo plivastigis sian agadkampon kaj ekde tiam ĝi ne nur popularigas la rusan lingvon kaj kulturon en Kroatio, sed ankaŭ la kroatan lingvon kaj kulturon en la lingvo rusa. Venis tempo enkonduki en tion ankaŭ la lingvon internacian (ja ĝi ekvivis en la rusa lingvo) kaj helpi interligigon de kroataj kaj rusiaj esperantistoj. Nun ni okupiĝos ne nur pri humanismaj temoj, sed ankaŭ pri la rusa kaj kroata lingvoj kaj kulturoj kaj pri la rusia kaj kroatia Esperanto-movadoj.



## Esperanto - genia projekto aŭ stultaĵo?

*✍* Marija Jerković

La 16-an de marto en la Societo pri la rusa lingvo kaj kulturo en Zagrebo okazis interesa prelego “Esperanto - ĉu genia projekto aŭ stultaĵo” de Mato Ŝpekuljak, kiu al dekduo da spektantoj proksimigis la Esperantajn historion kaj gramatikon. Mato Ŝpekuljak estas esperantisto kaj gvidanto de la Societo, montranta grandan intereson por Esperanto, kiu siajn radikojn ja havas en Rusio. La Societo anoncis ankaŭ Esperanto-kurson, kiu komenciĝis la 2-an de junio.

## El la Filozofia fakultato

Per skriba ekzameno el gramatiko kaj buŝa solvado de teoriaj demandoj finiĝis la seminario “Interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto” gvidita de profesoro Velimir Piškorec en la studjaro 2012/2013 ĉe la Filozofia fakultato de Zagrebo. La ekzameno okazis la 12-an de junio, partoprenita de 24 gestudentoj.

## Davor Grgat ankoraŭfoje ricevis dankdiplomon

Komunumo Podstrana atribuis dankdiplomon al esperantisto Davor Grgat el Mali Rat pro lia ĵurnalista kaj informa laboro pri la Komunumo. La dankdiplomon Grgat transprenis la 20-an de junio el la manoj de la komunumestro.





# ESPERANTO OMAĜITA EN HRVATSKA KOSTAJNICA

*Nataša Dorosulić*

La pitoreska urbeto Hrvatska Kostajnica kuŝas sur la kroata bordo de la rivero Una, najbare de Bosnio kaj Hercegovio. Malmultaj scias, ke dank' al instruistino Antonija Jožičić, kiu en la komenco de la 20-a jarcento vivis tie, Esperanto ricevis sian fortan radikon kiu eĉ nun donas nekutiman frukton.

Antaŭ precize 100 jaroj, la agema esperantistino Antonija Esperantigis kaj publikigis la verkon "Konfeso" de Milka Pogačić. La libro aperis en 1913 en la presejo Vugrin en Kostajnica kiel unu el la plej fruaj eldonaĵoj en Esperanto en Kroatio. Sed ankoraŭ unu grava fakto estas ligita al tiu libro. Iel ĝi atignis Ĉinion, kie la verkisto Wang Luyan kiel la unuan verkon el la kroata literaturo, pere de Esperanto tradukis ĝin en la ĉinan. La ĉinlingva eldono aperis en Ŝanhajo en la jaro 1931.

La vivhistorion de Antonija Jožičić pli detale esploras Spomenka Ŝtivec, kiu ankaŭ agis por diskonigi ŝian jam forgesitan laboron kaj kontribuon al disvastigo de la kroata literaturo eksterlande. Kiel rezulto de ŝiaj klopodoj, la Turisma asocio de la urbo Hrvatska Kostajnica organizis solenan omaĝprogramon "Vespero kun Antonija Jožičić", kiu okazis la 19-a de aprilo en la hotelo "Central". En la programo partoprenis profesorinoj Ines Konjevod kaj Mirela Bartolić, estonta profesorino Ana Račić, studento de la ĉina lingvo Marin Mikulić, kaj esperantistojn en la solenaĵo reprezentis Judita Rey Hudeček kaj Nataša Dorosulić.

Antonija Jožičić estis infano naskiĝinta en la instruista familio en Nova Gradiška la 6-an de junio 1869. Ŝi frekventis popollernejon en Petrovaradin kaj Brod na Savi, kaj porinstruistan lernejon en Zagrebo. Kiel instruistino ŝi laboris en Velika Kapanica kaj Vinkovci, sed la plej grandan parton de sia vivo (ekde 1902 ĝis sia pensiigo) ŝi pasigis kiel instruistino de matematiko, desegnado kaj belskribado en Kostajnica. Ŝi mortis en Kostajnica en 1945, kaj estis entombigita en la tombejo de Sankta Roko samurbe.



*La tradukantino kaj ŝia libro*



*La tombo de Antonija Jožičić*



*La programo en la Hotelo "Central"*





# Lagoj

monda naturheredaĵo inter la unuaj en la mondo.

En la regiono de Lagoj de Plitvice troviĝas la fonto de la rivero Korana, kiu sian akvon ricevas el la lagoj.

La suma areo de Nacia parko Lagoj de Plitvice okupas 29.685 hektarojn, el kio 13.230 hektaroj estas arbaroj. Averaĝa alteco estas 600 metroj suepr marnivelo. La plej malalta punkto situas je 367, kaj la plej alta je 1.279 metroj.

La nomo "Plitvice" por la unua fojo estis menciita en skriba dokumento en 1777. Ĝia nomo devenas de "pličina" aŭ "plitvak", kio signifas "malprofunda akvo".

Nacia parko "Lagoj de Plitvice" estas specifa geologia kaj hidrologia karsta fenomeno. La komplekso de Lagoj de Plitvice estis proklamita nacia parko la 8-an de aprilo 1949. Ĝi estas la plej granda, la plej malnova kaj plej ofte vizitata kroacia nacia parko. Ĝi prezentas arbokovritan montaran regionon, en kiu situas 16 lagoj kaj lagetoj kun kristale bluverda akvo. La lagoj ricevas siajn akvojn el multaj riveroj kaj rojoj, kaj inter si ili estas kunligitaj per kaskadoj kaj akvofaloj. Kalktofaj barieroj formiĝintaj dum la pasintaj dek mil jaroj, estas la fundamenta specifaĵo de la Parko. Aparta geografia situo kaj klimataj karakterizaĵoj grave kontribuis la ekeston de multaj naturaj fenomenoj kaj riĉa biologia diverseco. La parko konsistas el Supraj lagoj en la sudo kaj Malsupraj lagoj en la nordo. La Supraj lagoj estas formitaj el dolomitoj kaj la Malsupraj el kalkŝtonaj rokoj.

Vasta arbara komplekso, ekscitiga beleco de la lagoj kaj la

akvofaloj, riĉeco de flaŭro kaj faŭno, modere montara klimato, kontrastoj de aŭtunaj koloroj, arbaraj padoj kaj ankoraŭ multaj aferoj, estas parto de tiu neripetebla tutaĵo, kiu UNESKO en 1979 proklamis





Dum jarcentoj la akvo sedimentis kalkŝtonon, pro kio ekestadis malprofundaj akvobasenetoj nomataj “pliĉine” kaj “plitvak”. Iuj sciencistoj kutimas aserti, ke la nomo devenas de la rivero Plitvica, kiu enfluas la lagojn en la malsupra, fina parto de la lagoj. Proksime ekzistas ankaŭ la samnoma vilaĝo.

La lagoj situas inter la montoj Mala Kapela kaj Plješivica, je 55-kilometra aerlinio disde la Adriatika maro, kiu estas facile atingebla per aŭtomobilo.

La Nacia parko konsistas el 16 ŝtupe lokitaj lagoj en longeco de 5.460 metroj. La Supraj lagoj estas: Proščansko jezero, Ciganovac, Okrugljak, Batinovac,



# de Plitvice

*Josip Pleadin*

Veliko jezero, Malo jezero, Vir, Galovac, Milino jezero, Gradinsko jezero, Veliki Burget kaj Kozjak, dum la Malsupraj estas: Milanovac, Gavanovac, Kaluderovac kaj Novakovića Brod. La plej granda kaj la plej profunda estas Kozjak kun 81,5 hektaroj kaj 47 metroj da profundo. Proščansko estas la dua laŭ grandeco kaj etendas sin je 2,5 kilometroj de sudo al nordo. En la parko ekzistas 30 grottoj, el kiuj nur du estas malfermitaj por vizitantoj.

La kalktofaj barieroj, kiuj dividas la lagojn inter si, estas tre fragilaj kaj bezonas altan gradon de protekto. Tri ĉefaj elementoj por ilia ekesto estas: amaso da akvo, kalkfotaj kreantoj kaj kalktofo mem. Sen akvo ekzistus nek la lagoj nek la akvofaloj, nek abunda vegetaĵaro. Kalktofaj kreantoj estas vegetaĵoj kiuj kreas kalktofajn barierojn kaj ŝanĝas formon de la lagoj kaj iliaj fundoj.

Unu el la plej belaj akvofaloj troviĝanta inter la lagoj Milanovac kaj Gavanovac, nomiĝas Akvofalo de Milka Trnina, laŭ la fama kroata operprimadono.

La ĉirkaŭaj arbozaj montoj estas rezervejoj de akvo kaj setlejoj de multaj bestospecioj.

La plej oftaj arbospecioj estas fago, abio, blanka pino, karpeno, alno kaj pino.

La ligno el la arbaroj estas uzata kiel konstrumaterialo kaj hejtajo. Abia kaj faga praarbaro Ĉorkova uvala estas aparta natura valoraĵo.

Jam en 1883 la arbara zono kiu ĉirkaŭas la lagojn kaj

akvofalojn estis proklamita speciala zono, kie estis malpermesata hakado de arboj. Ĉirkaŭ de la parko estas kovritaj per arbaroj, kiuj estas parto de Nacia ekologia reto kaj eŭropa naturprotekta projekto NATURA 2000. La arbaroj kaj la akvo estas inter si interplektitaj, kaj unu sen la alia ne povus ekzisti. La arbaroj estas tre kvalitaj, inkluzive de prarbaroj. En ili vivas bruna urso, lupo kaj linko, pego kaj arbara strigo.

En la parko ekzistas eĉ 1.267 plantospecioj, el kio eĉ 50 specioj de orkideoj, 321 specioj de papilioj, 157 specioj de birdoj kaj 20 specioj de vespertoj.

En la parka regiono homoj loĝis dum jarmiloj. Tie vivis Iliroj, Trakoj, Keltoj, Japodoj, Romianoj,

Avaroj, Slavoj kaj Turkoj. Dum la regado de Julio Cezaro la lagoj apartenis al provinco Iliriko. La Kroatoj ekloĝis ĉi tie en la 7-a jarcento.

La unuaj seriozaj spuroj de turismo ĉe Lagoj de Plitvice devenas el la jaro 1861. La oficiroj de Limregiono en tiu jaro konstruis la unuan turisman domon nomitan “Imperiestra domo”. En 1894 vizitis la lokon 1000 turistoj. En 1896 estis konstruita hotelo kun 28 ĉambroj, kaj la turismo multe influis la finkonstruo de fervojo en 1927. La turismo amase ekevoluis post la dua mondmilito, aparte post la proklamo de nacia parko en 1979. En 2011 estis pli ol unu miliono da vizitantoj, la unuan fojon en la historio de ĉi tiu parko.





# ESPLORE PRI AŬSTRALIA ESPERANTISTO JOHN MATASIN

*Josip Pleadin*

La vivhistorio de aŭstralia esperantisto **John Matasin** dum longa tempo restis nesufiĉe konata, kvankam temis pri unu el la plej aktivaj aŭstraliaj esperantistoj dum pli ol duonjarcento. Mi konis la nomon jam delonge, sed ĉiam lasadis pli profundan esploron por pli konvena tempo. Eble tiu tempo neniam venus, se ne okazintus mia konatiĝo kun la sidneja esperantistino **Nicole Else**. Per niaj komunaj klopodoj, rezultis tiu ĉi artikolo.



*Unu el malmultaj portretoj de John Matasin*

## LA NASKIĜLOKO KAJ LA FAMILIO

Laŭ neprecizaj informoj **John Matasin** (=Johano Matasin) devenas el proksimeco de Zagrebo (Kroatio), sed la unuan pli precizan difinon de tiu "proksimeco de Zagrebo" donis la nekrologo en "The Australian Esperantist"



*John Matasin (maldekstre) dum la geedziĝfesto de sia Esperanta amiko Wolo Guetling*

(septembro 1980, paĝoj 311-312). Tie la loko de lia naskiĝo estis precizigita kiel vilaĝo "**Ruĝkovac apud Zagreb (Jugoslavio)**". Tiu eta informo sufiĉis por ke mi serĉu per Google-mapoj la menciitan vilaĝon, kaj mi trovis ĝin 40 kilometrojn sudoriente de Bjelovar en Kroatio.



*La vojo al Ruĝkovac, fotita somere de 2011*

Do, la informo ke li naskiĝis "apud Zagrebo" estas malĝusta kaj nepreciza.

La vilaĝo troviĝas nur 65 kilometrojn for de mia hejmo, kaj mi decidis viziti ĝin. Laŭ la censo plej proksima al la dato de la naskiĝo de **John Matasin**, la vilaĝo Ruĝkovac havis nur 500 loĝantojn. Dum mia vizito mi konstatis, ke el antaŭaj 150 domoj, nun estas loĝataj nur malpli ol 30. Temas pri maljunaj homoj, kaj certe post 10-20 jaroj tiu vilaĝo ne plu ekzistos. Mi trovis maljunulon **Marko Modrić** kiu konis la familion **Matasin**, kaj li montris al mi la kadukan domon en kiu **John** kaj liaj gefratoj naskiĝis.

Kvankam la gefratoj de **John** formigris el la vilaĝo, ankaŭ nuntempe la familia nomo **Matašin** estas relative ofte trovebla en tiu regiono.

Antaŭ ol entrepreni la viziton al Ruĝkovac, mi informiĝis



**La kadukiĝinta naskiĝdomo de John Matasin en vilaĝo Ruškovac, fotita somere de 2011**

pri lernejoj de la regiono, kaj konstatis, ke klaslibroj de potencialaj lernejoj kiujn povis frekventi **John Matasin**, povus troviĝi en la Ŝtata arkivo en Bjelovar, la urbo kiun

mi ofte vizitadis pro profesiaj kaj esperantistaj taskoj. La supozon konfirmis la arkivisto de la nomita institucio, kaj mi vizitis la arkivon la 13-an de julio 2011. Dum

kelkhora foliumado de malnovaj libroj mi eksciis la plej gravajn informojn. **John Matasin** en la registro de naskiĝoj estis notita kiel **Ivan Matašin**, kroato, romkatoliko, naskiĝinta la 2-an de junio 1899 en Ruškovac, kiel laŭleĝa filo en la terkulturista familio de **Marko** kaj **Jana** (naskita **Habianac**). En la familio estis naŭ infanoj: **Marica** (naskiĝinta en 1884, mortinta kiel infano), **Tomo** (naskiĝinta en 1886), **Stjepan** (naskiĝinta en 1888), **Mato** (naskiĝinta en 1891), **Marica** (naskiĝinta en 1895), **Ivan** (naskiĝinta en 1899), **Vincencije/Vinko** (naskiĝinta en 1902), **Filip** (?) kaj **Jaga** (?)

## EDUKIĜO

**Ivan** frekventis Popol-lernejon en Stara Ploščica kaj Dežanovac (en la lernejoj jaroj inter 1907/1908 kaj 1910/1911) kaj Reĝan realan gimnazion en Bjelovar (1911/1912 - 1914/1915). En 1914, kiam komenciĝis la unua mondmilito, **Ivan** estis nur 15-jara, do tro juna por esti mobilizita kaj engaĝita en la milito, sed pro la kelk-jara militdaŭro, oni ne ekskludu ankaŭ la eblecon ke fine de la milito ankaŭ li estis mobilizita. Pri tiu ebleco tamen ekzistas neniam konfirmeblaj indikoj. Mi mencias la unuan mondmiliton, ĉar inter aŭstraliaj esperantistoj cirkulis onidiro, ke al Aŭstralio li venis kiel militrifuĝinto, kio en la postaj esploroj montriĝis absolute neĝusta.

El ĉiuj gefratoj, nur **Ivan** sukcesis fini gimnazion, kaj planis studi en Zagrebo, sed la malfacilaj vivkondiĉoj de liaj gepatroj-terkulturistoj, la milito kaj la postmilita ekonomia krizo, evidente negative influis lian deziron pri plua edukigo. Li devis esti pli praktika kaj trovi rapide ian laboron, sekve li devis ŝanĝi siajn ideojn pri studado, kaj dediĉi sin al ia monakira metio. Plej verŝajne jam en 1918 li venis al

1899	2. lipnja 3.	Joan Mat. sin	ruškovac	Marko Matašin: Jana Habianac rov. selj.	sin kad
------	--------------	---------------	----------	---	------------

**La noto pri naskiĝo de Ivan Matašin en naskiĝregistro**

445	Matašin	1899	2. lipnja	1	1	Marko
-----	---------	------	-----------	---	---	-------

**La nomo de Ivan Matašin en la registro de Popolternejo en Stara Ploščica**

Br. 44	Uĉenikevo	Oprošten od plaćanja školarine	Upisan na osnovi
prezime: <i>Matašin</i>	u I. polug. vis. otp. od ... br. →	svjedodžbe 5. razreda opće škole u Staroj Ploščici	kao <i>jamnik</i> sinik
ime: <i>Ivan</i>	u II. polug. vis. otp. od 1.1.1912 br. 1777 2. siječnja	Stipendija	Izvadak iz svjedodžbe od drugije donesene
dan, mjesec i godina rođenja: <i>2. lipnja 1899.</i>	iz zaklade	opći napredak: <i>1. razred realne škole</i>	svlađanje: <i>perma poluklasa</i>
mjesto rođenja: <i>Ruškovec</i>	u god. iznosu od ... K podijeljena odlukom	od ... br.	
domovina: <i>Kroatija</i>			
vjerodostojnost: <i>perma kalotička</i>			

**La nomo de Ivan Matašin en la registro de Reĝa reala gimnazio en Bjelovar**

Zagrebo, kie li fariĝis metilernanto, akirinte bonajn spertojn pri mebloproduktado kaj remburado.

## LA UNUA EDZINO MARTA BALENTOVIĆ

En Zagrebo li edziĝis la 30-an de septembro 1920 al **Marta Balentović**. La geedzeco daŭris tre mallonge, sed tamen tiu fakto sufiĉis por ke mi alfrontu la problemon en la esplorado de tiu lia vivoparto. Aŭstraliaj esperantistoj asertis, ke lia edzino nomiĝis **Eva**, sed **Ivan** kaj **Marta Matašin** estis notitaj en la listo de partoprenintoj de la Unua sudslava Esperanto-kongreso okazinta en Zagrebo en 1923, sub la kongresnumeroj 94 kaj 95. Estus vere grandega koincido ke du personoj, viro kaj virino, notitaj per du sinsekvaj vicnumeroj, ne estus geedzoj. En la postaj esploroj mi akiris nerenverseblajn pruvojn ke **Marta** estis lia unua edzino, kaj **Eva** la dua. **Marta** naskiĝis la 4-an de junio 1899 (do nur du tagojn post **Ivan**) en Županja. Ŝiaj gepatroj stis **Andrija** kaj **Manda**. Kvankam ne ekzistas informoj pri divorco de **Ivan** kaj **Marta**, ĝi tamen okazis, ĉar **Marta** reedziniĝis la 2-an de aprilo 1940 al neesperantisto **Milan Tonković** en Sarajevo (Bosnio kaj Hercegovino), kaj prenis lian familian nomon. Ŝi mortis la 16-an de junio 1887 en Županja kaj en la Urba tombejo ankoraŭ ekzistas ŝia tombo en kiu, krom ŝi, estas entombigitaj ankaŭ ŝiaj gepatroj.

## LERNADO DE ESPERANTO KAJ POLITIKA AGADO

**Ivan** lernis Esperanton en Zagrebo, enkadre de Zagreba Esperantista Societo (ZES), ĉe eminenta esperantisto **Paul Kastner**, tiutempe posedanto de la plej granda varmagazeno en Zagrebo "Kastner kaj Öhler" (poste: NAMA). En la ĝis nun konata biografio de **Ivan Matašin** estas



*Paul Kastner, kiu instruis Esperanton al Ivan Matašin*

skribite, ke li esperantistiĝis en 1908 en Zagrebo, sed certe ne povis esti tiu jaro, ĉar tiam li estis nur 9-jara kaj ne vivis en Zagrebo. Pli evidente temas pri la jaro 1918/1919, ĉar tiutempe aktivis ankaŭ la menciita **Kastner**. Mi asertas tion ankaŭ ĉar **Roko Pavoković**, la bona amiko de **Ivan**, lernis Esperanton ĉe **Stanislav Tomić**, kiu instruis Esperanton per sia lernolibro verkita nur en 1919. (Parenteze, **Stanislav**



*Roko Pavoković, la junaĝa amiko de Ivan Matašin*

**Tomić** estis fondinto de Esperanto-movado en Kolombio.) Tiuperiode kaj **Pavoković** kaj **Matašin** venis al Zagrebo (supozeble eĉ konatiĝis en Zagrebo pere de Esperanto). Al Zagrebo ili ambaŭ venis por serĉi laboron, kiel atestis **Pavoković**. El alia fonto ni ekscias, ke **Ivan** lernis la meblistan metion en Zagrebo en la jaroj 1918-1920, kaj ke li frue aliĝis al la komunista movado. Se li fariĝis komunisto en Zagrebo, tio povis okazi ĝuste en la momento kiam la Socialista partio akceptis la rezolucion pri Esperanto (Vukovar, 1920). La ĝistiam burĝa Zagreba Esperantista Societo, kiel konfirmas la dokumentoj konservitaj en la arkivo de Dokumenta Esperanto-Centro, tiuperiode estis influita de multaj maldekstruloj el laborista klaso, kio ne plaĉis al **Paul Kastner**, la Esperanto-instruisto de **Matašin**, kaj **Kastner** kun multaj aliaj retiris sian membrecon en ZES.

Mi klopodis kontroli en la konservitaj membrolistoj de ZES, ĉu **Ivan** kaj **Marta Matašin** estis ĝiaj membroj, sed nenie troveblas iliaj nomoj.

## FORIRO EKSTERLANDEN

Mi bone konis la junaĝan amikon de **Ivan Matašin**, respektive la fotiston **Roko Pavoković**, kiu vivis en Virovitica, la urbo troviĝanta je 40 kilometroj de mia loĝurbo. Kelkfoje mi vizitis lin dum lia oldula aĝo, kaj liajn rememorojn pri **Ivan Matašin** mi notis en mia taglibro la 17-an de septembro 1982 jene:

"**Pavoković** estis profesia fotografo. Dum laborkrizo de 1920-aj jaroj, li foriris al Split (1923), kaj helpe de splitaj esperantistoj (**Rubčić**), trovis laboron en unu el la plej kvalitataj foto-atelieroj, ricevinte loĝadon kaj manĝojn. Tie li laboris dum kelkaj monatoj, sed poste, pro la sama laborkrizo, kune kun **Ivan Matašin** li foriris al la 15-a Universala Kongreso de Esperanto



en Nürnberg (1923). Revenante li restis en Vieno, dum **Ivan Matašin**, cetere remburisto, restis en Germanio, kaj de tie elmigris al Suda Ameriko. **Matašin** cetere poste vivis en Sidnejo en Aŭstralio kaj ĝis la lasta vivotago estis unu el la plej gravaj sidnejaj esperantistoj.”

Kiel multaj aliaj aferoj en la vivo de **Ivan Matašin**, ankaŭ lia vojaĝo al la UK en Nürnberg estis kurioza. En mia taglibro mi notis, ke **Pavoković** asertis, ke la vojaĝo okazis per motorciklo!

La 15-a UK en Nürnberg, kiu estis ilia celo, okazis inter la 2-a kaj 8-a de aŭgusto 1923, kaj la unua sudslava kongreso okazis en Zagrebo inter la 29-a kaj 31-a de julio samjare. Tio signifas, ke **Matašin** kaj **Pavoković** tuj post la sudslava kongreso veturis al Nürnberg. Certe temas pri la aludita motorcikla vojaĝo, ĉar Pavoković tre ŝatis motorciklojn, kaj verŝajne li estis veturiganto, kaj Matašin kunveturanto.

Kiel la ĉefan kaŭzon de sia eksterlanda vojaĝo ili prezentis la deziron trovi laboron en Germanio. Ili kalkulis pri helpo de esperantistoj, aparte de membroj de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), fondita du jarojn antaŭe. Kiel konate, **Matašin** estis frutempa membro de SAT, ĉar la nekrologo en “Sennaciulo” (novembro 1980, paĝo 96) indikas, ke li estis membro de SAT ekde ĝia fondiĝo kaj ke lia matrikulo portis la numeron 1566. Tiun informon al mi afable sendis **Vinko Markovo** el Parizo.

Sed, eble la serĉado de laboro estis nur preteksto, aŭ nur unu el la kialoj de la elmigro. **Marko Modrić** en Ruškovac asertis, ke la plej grava kialo estis la politika agado de **Matašin**, kiu tiutempe jam estis konata al la polico kiel komunisto.

En Nürnberg la du kamaradoj ne trovis laboron, kaj ili klopodis serĉi ĝin ankaŭ en Leipzig. Post malsukcesa serĉado,

ili planis elmigri al Argentino aŭ Aŭstralio. **Roko Pavoković** tamen lastmomente rezignis, kaj restis dum iom da tempo en Vieno, sed fine ricevis monon de sia patro, revenis Kroation kaj malfermis foto-atelieron en Virovitica. **Ivan Matašin** dume restis en Germanio.

En la kazo de **Matašin**, verŝajne gravan rolon ludis ankaŭ liaj malboniĝintaj rilatoj kun la unua edzino **Marta**, sed **Wolo Gueltling** en sia letero el somero 2011, skribante rememorojn pri sia amiko **Ivan**, mencias ankorau unu bizaran kaŭzon de lia elmigro. Laŭ tiu informo Ivan volis konatiĝi kun la saniga hidroterapia metodo

de **Louis Kuhne**. Tio povas esti klarigo pro kio **Ivan** vizitis la urbon Leipzig. Nome, Leipzig estis loĝloko de **Kuhne**, en kiu li fondis (en 1883) la hidroterapian sanigcentron. Tamen, **Ivan** ne sciis ke **Kuhne** mortis ankoraŭ en 1901, kaj **Ivan** trovis nur la vidvinon de **Kuhne**, kiu vendis al li nur la edzajn librojn, sed sciis nenion pri la saniga metodo mem. Ŝajnas, ke ankaŭ en la posta vivo **Ivan** tre zorgis pri sia fizika kaj mensa sano, kaj kelkaj anekdotoj el lia vivo montras ke eĉ kiel 70-jarulo li facile grimpis sur arbojn.

*(daŭrigo en la sekva numero)*



*John Matasin/Ivan Matašin (staranta la dua de maldekstere) kun siaj gefratoj en la naskiĝvilago Ruškovac en 1957*

# DOMINADO DE LA ANGLA EN EŬROPA UNIO

 Ante Biluš



Se fiaskis kaj estis preterlasitaj ĉiuj antaŭaj okazoj por "altrudi" Esperanton al la Mondo, oni ne kapitulacu. Aparte oni ne timu la forton de la "okupita lingva teritorio" far la agresema angla.

Esperanton oni devas gardi, pliperfektigi kaj konstante fortigi samkiel la unuaj kristanoj gardis sian kredon en la romaj katakomboj. Kaj atendi ĝian "finan venkon" - eĉ se ĝi okazos post "kelkaj jarcentoj".

Oni ne eraru devigante infanojn lerni ĉi tiun lingvon en lernejoj, apud la jam evidenta troŝarĝigo per lernendaĵoj.

Esperanton devas akcepti la edukita elito de la Mondo, havanta fortan volon por renovigi kaj konservi ĝin por la tago kiam ĝi okupos la lokon de komuna monda lingvo.

Kiam tio okazos? En sia enkonduka parolado dum la 6-a kongreso de kroataj esperantistoj okazinta la 31-an de majo 2003 en Zagrebo, la tiama prezidanto de Kroata Esperanto-Ligo, nuntempe jam ne plu vivanta akademiano **Dalibor Brozović**, interalie bele diris: "La homaro neeviteble ekkonos la bezonon pri unu sendependa, ĉies kaj nenies, logika, riĉa kaj facile lernebla internacia lingvo - kaj prenos Esperanton. Sed kiam? La jaroj en la historio estas rapide pasantaj kaj sensignifaj. Tiam nenion oni demandos nin. Kaj ni ne bedaŭros tion..."

Esperanto tamen klopodadis, sed malforte kaj timeme, tratabi sian vojon al monda politika kaj lingvopolitika scenejo. Malforte kaj timeme, ĉar la Esperanta organizaĵo, mallaŭta, civilizita kaj nealtrudiĝema, havas nenian sian komitaton aŭ fakon kiu, "per pli da muskoloj", prizorgus tiun ĉi temon.

La unua provo de la monda Esperanta organizaĵo estis la pentema propono al Ligo de Nacioj,

---

*La plej bona tempo por planti arbon estis antaŭ 20 jaroj.*

*La plej bona estonta tempo por planti arbon estas - hodiaŭ.*

---

kiu ekzistis en Ĝenevo post la unua mondmilito, por preni tiun ĉi lingvon por sia oficiala lingvo. Kompreneble, Ligo de Nacioj rifuzis la proponon.

La dua provo de la monda Esperanta, roterdamo organizaĵo estis post la dua mondmilito sendita al la nove fondita Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj (OUN).

La sekretario de OUN transsendis ĝin al sia suborganizaĵo UNICEF (respondeca pri kulturaj demandoj), kiu formulis ke "tiu lingvo estas rekomendinda por lernado"!

Samtempe OUN per sia valida Statuto decidis ke, dum ĉiuj ĝiaj kunvenoj kaj en ĉiuj oficejoj, estos uzataj egalrajte ses "grandaj" mondaj lingvoj: la araba, franca, angla, ĉina (putong hua), rusa kaj hispana. Esperanto eĉ nemenciita!

Kompreneble, baldaŭ plene supervenkis la angla (la usona, la "hejma") lingvo. La Esperanta monda "registro" en Roterdamo ĉi tion akceptis sen kontraŭstaro. Esperanto "katiris" flanke, anstataŭ "frapi la tablon per pugno" kaj sin plenrajte altrudi.

Finfine, nuntempe por Esperanto denove montriĝas grandioza okazo. Ĝi estas Eŭropa Unio. Ĉi tiun komunajon projektis francaj kaj germanaj politikistoj ankoraŭ meze de la pasinta jarcento. La 25-an de majo 1957 en Romo renkontigis ses landoj kaj fondis tiun ĉi organizaĵon. La sesopo uzis kvin lingvojn: la italan, germanan, francan, anglan kaj nederlandan. Sed la dokumentojn jam tiam ili verkis nur en la angla. Ili kompilis la Statuton (*Consolidated version of the Treaty Establishing the European Community*) de la nova komunajo, en kiu la *artikolo 314* tamen difinis la lingvon en kiu ili interparolos. La famega kaj deviga Statuto diras la jenon:

"Ĉi tiu Kontrakto ... verkita en la nederlanda, franca, germana kaj itala, en ĉiuj lingvoj idente, estos deponita en la Arkivo de la itala registro.

Oni garantias ("*persuant*") ke la dana, angla, finna, greka, irlanda, portugala, hispana kaj sveda versioj de ĉi tiu Kontrakto estos identaj."

Kvankam en tiu ĉi teksto verdire ĉio estas "malklara", tamen ĝia senco estas: **al ĉiu el la dekduo da lingvoj doni nenian eblecon, nek nun, nek poste, havi pli grandajn rajtojn aŭ prioritaton en la uzado!**

Ĉiuj dokumentoj de la Unio, ĉio parolata aŭ skribata, devis esti tradukata al ĉiuj lingvoj.

En la Unio ĉi momente estas 27 landoj kun siaj 24 lingvoj: 1. bulgara, 2. ĉeĥa, 3. dana, 4. angla, 5. estona, 6. finna, 7. franca (Francio kaj Valonio en la sudo de Belgio), 8. greka (Grekio kaj Cipro), 9. irlanda (gaela), 10. luksemburga, 11. litova, 12. latva, 13. hungara, 14. malta, 15. nederlanda (Nederlando kaj Flandrio en la nordo de Belgio), 16. germana (Germanio kaj Aŭstrio), 17. pola, 18. portugala, 19. rumana, 20. slovak, 21. slovena, 22. hispana (kastilia), 23. itala kaj 24. sveda.

Ĉiu lando aŭ nacio alportas en la Union sian norman, kaj se ĝi volas - ankaŭ iun alian lingvon, kiu fariĝas egalrajta al la aliaj. La reprezentantoj de tiu lando povas "siajn paroladojn" prezenti aŭ verki en tiu lingvo. Post tio la interpretista sistemo tradukas la paroladon al ĉiuj aliaj lingvoj.

Sed tuj estis klare ke interparoli en 24 lingvoj kaj ĉon tradukadi estos organiza teruraĵo, kaj "financa truo sen fundo".

Por esti tion - mallaŭte, al neniu klare, kaŝite oni altrudis nur unu solan lingvon, kaj ja ĝuste la anglan. Ĝi venkis la francan kaj la germanan (la lingvojn de la fondintoj de la Unio), kaj kompreneble ankaŭ ĉiujn aliajn. La *artikolo 314* do fariĝis senvaloraĵo.

La altrudon de la anglan oni eĉ klarigis per jenaj vortoj: "... kiel aspektus niaj konstruaĵoj, oficejoj, ĉiuj pordoj en ili, se ĉie estus pendigitaj tabuletoj kun 24- aĉ eĉ kun 27-liniaj surskriboj?"

Tiaj surskriboj (ekzemple ĉe enirpordoj de multaj konstruaĵoj kaj salonoj de Eŭropa Unioo estus vere ridindaj. Tial iu decidis ke estu skribite mallonge kaj klare "entrance". Sed kiu kaj kiam decidis pri tio, restas sekreto! Ĉu en la senco de la jam menciita *Statuto*, kaj eĉ pli en la senco de la *artikolo 314*, oni ne devus skribi sinsekve: *vhod, Eingang, vchod, vlez, είσοδος, ingång, entrada, entrata, bealach, isteach, introitus, bejârat* ktp, se ili ja ne akceptas ke ĝi estu skribita en la komuna lingvo Esperanto: *enirejo*.

Tio ĉi ne mirigas, ĉar la Esperanto-movado kaj la Esperanta ideo ŝajne jam malvenkis en la konkurado kun la angla. La angla do nuntempe senkonkurence dominas en Eŭropa Unio. Neimageblas ke iu ajn el la deputitoj de unuopaj landoj povus eniri tra iu ajn pordo de Bruselo au Strasburgo, ne parolante (flue kaj senerare) la anglan lingvon.

Jen, ankaŭ Kroatio plenforte penadas por eniri la Union. Kaj ĝi eniros ĝin la 1-an de julio ĉi-jare. Antaŭ ol tio okazos, ĝi pretigas personaron kiu ĝin reprezentos. Sed unu, fakte neevitebla kondiĉo al tiuj estontaj reprezentantoj de Kroatio estas - flue kaj

senerare paroli, skribi kaj legi la anglan!

Kial, se en Eŭropa Unio ni egalrajte povos uzi la kroatan, kiu tie estos parolata, kaj poste tradukata al la ceteraj, same tiom egalrajtaj lingvoj?

Mensogo kaj artifiko! Iluzio kaj trompo!

En la tieaj kunvenoj iuj parolantoj kelkfoje elpaŝas per sia lingvo, sed la ceteraj tuj riproĉas ke oni ĉesu molesti ilin kaj devigi denove surmeti aŭskultilojn, pro kio la parolantoj rezignas pri sia nacia lingvo. Kaj la interparolado daŭras nur en la imperia lingvo.

La "sankta" *artikolo 314* diras, ke ĉiu lando per sia aliĝo al la Unio, venas kun sia lingvo kiu en la Unio fariĝas oficiala.

La formulaĵo "kun sia lingvo" sendube signifas: kun la lingvo kiun ĝi elektas, kaj tiu do ne devas esti precize la sama kiel la norma lingvo en difinita lando. Hipoteze - iu lando povas elekti ekzemple la latinan aŭ iun fremdan lingvon, laŭ la propra decido.

**Ni varme deziras kaj proponas ke Kroatio** (kiu fariĝis membro de Eŭropa Unio), **por sia reprezentanta lingvo elektu Esperanton!** Ni opinias, ke ĝi rajtas (eĉ lastmomente) ŝanĝi tion kion jam antaŭ longa tempo en Ateno, subskribis la tiama prezidanto de la kroata registaro **Ivica Raĉan** en la peto pri akcepto. Tie li diris ke Kroatio alportos en la komunajn sian norman, literaturan lingvon.

Ĉu la decido pri elekto de Esperanto en Kroatio incitus la opozicion, provokus konfuzon, protestojn aŭ disputojn? Eble ne! Eble (tamen) la saĝa kroata publiko komprenus ke post tio sekvas por la tuta mondo la historia solvo de la jarmila lingva problemo. Eble la kroataj Parlamento, registaro, eklezio, akademio, politikistoj, lingvistoj ... la tuta nacio komprenus la viziecon de ĉi tiu faro. La kroata lingvo en Eŭropa Unio, samkiel multe pli grandaj lingvoj (la franca, germana, hispana, itala), estos nur mokobjekto al la regantoj. Kial ni eksponu ĝin al moko? Ni retenu ĝin hejme kaj gardu ĝin plenzorge. Ni zorgu pri ĝi kaj flegu ĝin samkiel ĝis nun, kaj nian ekzemplon, ni certas, unu post la alia sekvos ankaŭ aliaj malgrandaj membriĝintaj ŝtatoj, kaj post ili ankaŭ la "grandaj", kiuj estas same malkontentaj kaj ofenditaj per la atakegoj de la angla.

Finfine en Eŭropa Unio, sekve ankaŭ en la tuta mondo, ekregos PAX ESPERANTA.

Ĉio ĉi al multaj ŝajnos "*my dream*" (mia revo), kiel siatempe diris la fama negro **Martin Luther King**, songante pri libero de sia raso. Sed lia revo tamen realiĝis.

Se Kroatio ne havos kuraĝon kaj saĝon por tiel grandega paŝo, anticipu nin iu alia nacio, pli decida kaj pli viziema. Mi ripetos la vortojn de **Dalibor Brozović**: *Ni, esperantistoj, ne bedaŭros tion.*

Sed mi mem bedaŭros (kredante ke same bedaŭros ankaŭ vi, karaj legantoj), ĉar mia patrujo ne portos la gloron de lando kiu finfine faris Esperanton la lingvo de la Mondo.



## KROATIO DENOVE KANDIDATO POR UNIVERSALA KONGRESO

*Kroata Esperanto-Ligo*

La 15-an de julio la sekretariino de Kroata Esperanto-Ligo Spomenka Štimec, en la oficejo de la urbestro de Zagrebo Milan Bandić, transprenis lian leteron al Kroata Esperanto-Ligo per kiu li konsentas ke Kroata Esperanto-Ligo kandidatigu Zagrebon por la urbo de Universala Kongreso de Esperanto ekde la jaro 2016 (aŭ la postaj jaroj).

La urbestro subskribis la dokumenton ke la urbo Zagrebo disponigos la koncertejo "Vatroslav Lisinski" senpage, invito al la koktelo la kongresanojn kaj ebligos ke la kongresanoj dum la zagreba kongresa semajno uzu senpage la urban trafikon.

La letero estas la rezulto de la laboro, konforme al la decidoj de la jarkunveno okazinta en Koprivnica.

La letero de la urbestro estos transdonita al Universala Esperanto-Asocio en la Universala Kongreso en Rejkjaviko.

## EEU EN 2014 EN KROATIO

Kiel informas "Eŭropa bulteno" kaj "Tempo", la oficialaj gazetoj de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) kaj Kroata Esperanto-Ligo, la 10-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio okazos inter la 6-a kaj 11-a de julio 2014 en Rijeka (Kroatio). Per la jubilea kongreso EEU deziras saluti la novan membron de Eŭropa Unio, kia Kroatio fariĝis la 1-an de julio ĉi-jare. La kongreson organizos Organiza komitato konsistanta el po tri membroj de EEU kaj Esperanto-societo Rijeka. La urbestro de Rijeka, s-ro Vojko Obersnel oficiale invitis la kongreson al Rijeka kaj la urbestro disponigos kiel kongresejon la urban Kulturdomon. Pli detale pri la aranĝo leĝeblos en la kongresa retejo ekfunkcionta ĉi-aŭtune.

Unuiĝo de prelegantoj de Esperanto kaj Bjelovara Esperantista Societo  
invitas vin partopreni en la

### DEKLAMKONKURSO

la 22-an de septembro 2013 en Bjelovar

La deklamkonkurso estos parto de la programo "Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo", okazonta honore al la Tago de la urbo. Partopreni povas junaj esperantistoj, lernantoj de elementaj kaj mezlernejoj el Kroatio kaj ankaŭ el aliaj landoj.

**Temo:** deklamado de originala Esperanta poezio kaj kroata poezio tradukita en Esperanton.

- Premioj:** 1. Transira pokalo al plej bona deklamanto  
2. Tri libropremioj  
3. Diplomoj por ĉiuj partoprenantoj

La deklamadon prijuĝos ĵurio konsistanta el tri membroj, kiujn nomumos la organizantoj.

Bjelovara Esperantista Societo organizos senpagan tagmanĝon por ĉiuj deklamantoj, kaj la vojaĝkostojn pagos la partoprenantoj mem. Deklamantoj povas esti individuaj esperantistoj, aŭ literatur(em)aj grupoj gvidataj de plenkreskulo.

Aliĝojn bonvolu sendi al:

*Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto, ĉe Marija Jerković  
Jarunska 6, 10000 Zagreb; mjerkovic@net.hr*

**Renkontiĝo de Esperantlingvaj verkistoj kaj tradukistoj** okazos inter la 13-a kaj 15-a de septembro en la bieno Njeguš de Spomenka Štimec en Hrašćina. La ĉefa gasto estos Acktar Etemadi el Teherano (Irano), kiu persigas la libron "Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić" kaj la verkista paro Julia Sigmond el Rumanio kaj Sen Rodin el Italio.



# INTERLINGVISTIKO KAJ ESPERANTOLOGIO DAŬRE ĈEESTAS EN LA PALETRO DE UAM

*Ilona Koutny*

Jam de 15 jaroj fino de septembro kaj komenco de februaro estas dediĉita al la intensaj sesioj de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz. Ili havas firman lokon en la universitata paletro kaj proponas universitatnivelan studadon kun fina atestilo al ambiciaj esperantistoj. Ili entreprenas ankaŭ la formadon de esperanto-instruistoj. En la tria jaro de la Studoj okazas instruista specialigo. Kunlabore kun ILEI kaj Edukado.net tio kiel instruista trejnado estas ofertata ankaŭ al pli vasta publiko, kiu volas instruistan spertiĝon dum unu jaro. Simila kurso jam estis organizata kelkfoje kun la gvido de Katalin Kovats. Aliĝantoj estas atendataj por la septembra sesio (14-20). Informoj: en la retpaĝo de la Studoj kaj [interlin@amu.edu.pl](mailto:interlin@amu.edu.pl). La 5-a grupo de la Interlingvistikaj Studoj travivis sian 4-an sesion inter la 2-8-a de februaro en Poznano. Kvankam la nombro de studentoj iom malpliigis, la persistuloj (4 el Brazilo, po 2 el Svislando kaj Pollando, po unu el Germanio, Hungario kaj Rusio) aktive partoprenis la sesion. Stipendioj de ESF kaj ILEI-UEA daŭre helpas al kelkaj.

Aleksander Korjenkov, ruslanda eldonisto kaj esploranto lekiis pri la historio de esperantomovado: skizis la ĉefajn eventojn, konfliktojn kaj tendencojn en Esperantujo, kiuj fojfoje surprizis la studentojn, kaj montris la kaŭzojn de tiuj ŝajnaj neklarigeblajoj. La lingvistikajn kursojn gvidis Ilona Koutny multe diskutante kun la gestudentoj. Ŝi prezentis la

<http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>



semantikan sistemon de esperanto, kun ĝiaj fontoj kaj memstara evoluo, analizis la semantikajn rilatojn inter la elementoj de la vortoprovizo kaj la frazeologizaĵojn, tuŝis la problemon de lingvotavoloj kaj provis trovi la lokon de esperanto inter la etnaj lingvoj perhelpe de lingvotipologio kadre de gramatika kurso. Ŝi esploris la specifajojn de la esperanta lingvouzo en diversaj eventoj kaj ĝentilecformoj kadre de pragmatiko. Kurso pri aplikata lingvistiko enkondukis i.a. al lingvoplanado, tradukado, leksikografio, terminologio kaj komputa lingvistiko.

Al la programo kontribuis

Zbigniew Galor, profesoro pri sociologio, per prelego pri socio kaj lingvo. Gastprelegis Christoph Goro Kimura, profesoro pri lingvistiko el Tokio, pri la interlingva komunikado, pri la interna ideo kaj la neeŭropa aliro al esperanto. Li revenos en aprilo por prelegi en la Lingvistika Instituto pri siaj esploroj - laŭ la invito de la institutestro.

La bonetosan kaj riĉan kursaron kompletigis la komuna vespero en la fervojista domo, kie la partoprenantoj prezentis poemojn kaj Mirejo Grosjean parolis pri afrikaj etosoĵoj. Post la kurso okazis ekskurso al Vroclavo, kie la lokaj esperantistoj gvidis nin tra la urbo.



*Sur la fotoj de supre malsupren: 1) En la Elementa lernejo "Fran Viktor Ŝignjar" en Virje, vizite al la 2A klaso kaj la klasestrino Ivanka Seleš; 2) Gastoj ĉe la familio Ježovita en Križevci; 3) Spektante koncerton kun bjelovaraj esperantistoj; 4) Kun la imperiestrino Maria Theresia fotitaj en Bjelovar.*



# BORIS ARRATE EN KROATIO

*Laŭ la raporto de Dokumenta Esperanto-Centro*

Pasintjare la kuba esperantisto Boris Arrate Veranes el Santiago de Cuba, kiu jam de 13 jaroj vivas en Érd (Hungario), partoprenis la 10-an kongreson de kroataj esperantistoj en Koprivnica. Post la kongreso li fariĝis peranto inter Dokumenta Esperanto-Centro el Ĝurdevac kaj la blovorkestro Lukin Fúvószenekear el Érd, klopodante organizi turneon de la hungara orkestro en Kroatio dum junio ĉi-jare. Kvankam la turneo ne realiĝis pro la subita ŝanĝo de la datoj dum kiuj okazos Križevaĉko veliko spraviŝće, kiu estis ilia ĉefa celo. La turneo de la orkestro estas prokrastita por iu pli konvena tempo, sed DEC el Ĝurdevac ebligis al Boris Arrate individue viziti Kroation kaj vidi la lokojn en kiuj la hungara orkestro devis koncerti.

Boris Arrate estis gasto de DEC inter la 12-a kaj 17-a de junio, havinte intensan kaj riĉan programon. Li vizitis la pasintjare starigitan memortabulon al Ilija Puhalo en Koprivniĉki Bregi (la 12-an), partoprenis la filmadon de milenia foto en Ĝurdevac (la 13-an) kaj la "Kuban vesperon" (la 13-an) en DEC. La 14-an de junio li vizitis la modelan elementan lernejon "Fran Viktor Ŝignjar" en Virje kaj ĝian 2A klason de klasestrino esperantistino Ivanka Seleš, kies lernantoj preparis mallongan kantan kaj dancan programon. La gaston mallonge salutis la direktorino de la lernejo s-ino Marica Cik-Adaković kaj pluraj instruistoj. Post la lerneja vizito, Boris vizitis la familion de esperantisto Martin Mihaldinec en Virje, kie ili trarigardis la pentrajkolekton de la pentristo kaj kultura aganto Fran Viktor Ŝignjar. La 15-an kaj 16-an de junio, Boris kaj kelkaj membroj



de DEC vizitis la familion de esperantistino Milica Ježovita en Križevci, renkontinte ankaŭ la esperantistinojn Dunja Šverko el Križevci kaj la membrinojn de Esperanto-societoj Sisak kaj Petrinja Nataša Dorosulić kaj Markica Vujnović. La 15-an oni ĉeestis koncerton en Križevci, kaj renkontiĝis kun la direktorino de Turisma asocio s-ino Olinka Gjigaš.

Vespere, la 15-an de junio Boris renkontiĝis kun deko da membroj de Bjelovara esperantista societo, kiuj kune kun li spektis la koncerton de muzikgrupo "Los Caballeros", kiu estis programero de loka festo "Terezijana", en Bjelovar. Bjelovar estis vizitloko ankaŭ la 16-an de junio, kiam oni ĉeestis la ceremonion de husaroj, salutis la alvenintan imperiestrinojn Maria Theresia kaj fotiĝis kun ŝi. Boris havis bonŝancon saluti ankaŭ la novan/manovan urbestron de Bjelovar s-ron Antun Korušec, kiu estas granda amiko de bjelovaraj esperantistoj kaj ĝui ec du koncertojn, el kiu aparte interesa estis la koncerto de grupo "Cubismo", kiu ludas originan kuban kaj latinamerikan muzikon.

La gastado de Boris finiĝis la 17-an de junio, kiam li adiaŭis siajn gastigantojn kaj promesis tre baldaŭ denove veni al Kroatio. Li daŭre klopodos realigi la planitan turneon de la orkestro Lukin Fúvószenekear el Érd, en kiu li ludas.





# La geedzoj Dahl ŝatas Kroatian

 *Davor Grgat*



“Hodiaŭ ni rigardis la fotojn el la memorinda renkontiĝo en Kroatio. Por esprimi la kontentecojn pri niaj travivaĵoj ĉia priskribo estus tre magra.”


Tiel skribis gesamideanoj Hans kaj Gunvor Dahl el Svedio, kiuj inter la 20-a de aprilo kaj 4-a de majo ĉi-jare somerumis en Omiš, surloke helpitaj de Davor Grgat. Dum sia feriado ili havis la okazon viziti la plej gravajn kultur-historiajn kaj turismajn vidindaĵojn en Split (Palaco de Diokleciano, Peristilo, malnova urboparto, haveno), kaj kompreneble ankaŭ la lokan Esperanto-societon.

Vojaĝante de Split al Omiš, ili vizitis la malnovan Respublikon Poljica, en kiu troviĝas la komunumoj Podstrana kaj Dugi Rat, kaj en Omiš ili plurfoje trarigardis la malnovan parton de la urbo, kun la rivero Cetina, kaj banis sla malnovan samideanon Ivo Puharić, la konatan oliviston, mongrimpanton kaj esperantiston.

La lastan tagon ges-roj Dahl, vizitis Mali Rat.

Fine ni menciuj, ke la geedzoj Hans kaj Gunvor Dahl, vizitis Kroatian jam kvarfoje, kaj al la verkinto de ĉi tiu artikolo ili promesis, ke ili certe denove vizitos la lando kiun ili tre ŝatas.

# KROATIO INVITAS ILEI-KONFERENCON

 *Marija Jerković*

La 46-a ILEI-konferenco okazis inter la 12-a kaj 18-a de julio en la Esperanto-urbo Herzberg am Harz (en Germanio) kun la ĉeftemo "Instruado de Esperanto al ĉiuj generacioj". Partoprenis 80 ILEI-anoj el 15 landoj, kaj inter la pendigitaj flagoj fiere flirtis ankaŭ la kroata. Mi prelegis pri "Kroata poezio tradukita en Esperanton", prezentinte la temon kronologie kaj per ekzemploj de bonaj tradukoj el la verkoj de Grigor Vitez, Vesna Parun, Miroslav Krleža kaj aliaj kroataj poetoj. Prezantitaj estis ankaŭ la tri kroataj dialektoj el kiuj devenas la poeziaĵoj. Samtempe mi kunagis kun la aŭskultintoj por elekti la plej interesajn poemojn kaj kune deklami ilin dum la komuna vespero.

Mi uzis la lokon kaj la eblecon por prezentis per projekciaĵo ankaŭ la atingojn de "Zagreba Esperantisto", pri kies aspekto kaj enhavo la ILEI-anoj estis agrable surprizitaj. La aŭskultintoj ricevis donace po unu ekzempleron de la prezentita gazeto, por povi ankaŭ "palpe" kaj "vide" pritaksi ĝiajn kvalitojn.

Tamen, eble la plej grava por Kroatio estis la prezento de vidindaj lokoj (Zagrebo, Varaždin, Vrbovec) kun la invito: "Venu al Kroatio por ILEI-konferenco!". Al la nove elektita prezidantino de ILEI, s-ino Mireille Grosjean el Svislando, mi transdonis la oficialan kandidatigleteron, per kiu Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto (UPE), Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE) kaj Dokumenta Esperanto-Centro invitas ILEI por unu el la estontaj konferencoj de la instruista organizaĵo elekti Kroatian. La estraranoj kaj la prezidantino de ILEI pozitive taksis la kandidatigon.

Cetere, la 46-a ILEI-konferenco kompletigis la Estraron de ILEI. Dum ĝi estis prezentitaj eĉ 19 prelegoj kaj elektitaj du Honoraj Membroj (Katalin Kovács kaj Stefan MacGill). La dua vicprezidanto fariĝis s-ino Gong "Arko" kaj estis akceptita la konferenca rezolucio kiu emfazas edukadon kiel fundamenton de la laboro de ILEI.



*La nova prezidantino de ILEI, s-ino Mireille Grosjean  
kaj Marija Jerković kun la kandidatiga letero  
por inviti ILEI-konferencon al Kroatio*

*Zagreba Esperantisto*

59

# MIAJ IMPRESOJ PRI BORIŠA MILIĆEVIĆ

 Zlatoje Martinov



Mi konatiĝis kun **Boriša Milićević** (1931-2013) dum mia unua partopreno en la kunsido de la Prezidantaro de Vojvodina Esperanto-Ligo (VEL) en Novi Sad en la jaro 1974. Nome, Esperanto-societo Pančevo, kies membro mi tiam estis, elektis min VEL-delegito. Tiam mi jam faris A ekzamenon, sed tamen estis malsperta esperantisto, nur iom pli ol pura komencanto. La timon kiun mi sentis inter la tiom konataj vojvodinaj esperantistoj (Kovacs, Vecsei, Mladen Vrtunski, Živan Milišavac, Boriša Milićević, Ludoviko Sekereš) rompis ĝuste Boriša, tiame kvardekjarulo kun nigraj lipharoj kaj amika rideto, per la vortoj unue en la serba ("Zdravo rode") kaj tuj poste Esperantlingve: "Bonvenon, kara amiko". (Tiu "rode" tro karkarakterizis lian serban alvorton al la amikoj kaj kunlaborantoj dum la tuta vivo!). Kial mi mencias la lipharojn? Nur tial ĉar li dum nia unua renkonto ŝerce alparolis min laŭte por ke ĉiuj povu aŭdi: "Ho, juna amiko, (tiam mi estis dudekjara studento) ni du devas subteni unu la alian ĉar inter ĉiuj ĉeestantoj en la ejo - ne kalkulatne doktorinon Borislava Mihajlović - (ŝi, jam pli ol sepdekjara, tiam estis sekretariino de VEL) nur ni du estas veraj viroj ĉar ni havas lipharojn!" Ĉiuj ridis. Poste li forrazis la lipharojn kaj oni poste neniel povis imagi lin lipharulo.

De tiam kaj ĝis lia morto, ni iĝis tre intimaj kunlaborantoj, unue en Vojvodina Esperanto-Ligo kie mi fariĝis prezidanto (1975-1977), kaj poste dum multaj jaroj en la Esperanto-Instituto. Post la morto de la tiama direktoro Antonije Sekejj (1986), la nova direktoro fariĝis ĝuste Boriša, kaj mi la sekretario. Dum preskaŭ tridek jaroj mi protokolisis kaj li la protokolojn pedante postulis de mi. Generale li estis pedanta homo, tre fervora kolektinto de esperantaĵoj diversaj:

libroj, tre raraj revuoj, bultenoj... Lia ne tre granda novisada loĝejo estis plenplena da ili.

Boriša estis bonega esperantisto kaj esperantologo. Same, li konis kelkajn aliajn lingvojn, ekzemple la francan kaj la portugalan. Li interesiĝis ankaŭ pri etimologio. Krom la demandoj pure Esperantaj ni ofte pridiskutis la strangajn vortojn en la serba aŭ en iu alia lingvo kies originon ni ne konis. Li kutimis diri: mi notos tiun vorton kaj demandas tiun kiu eble scias. Post unu monato aŭ pli, li telefonus al mi triumfe sciigante pri la solvo de la enigmo. Tre persiste kaj pedante li tion esploris kvazaŭ ĝi estus demando pri la vivo kaj la morto!

Li kaj mi publikigis en la jaro 1998 la instruigan libreton serblingvan pri la valoroj kaj atingajoj de Esperanto kaj la Esperanta kulturo titolita

"Esperanto u službi međunarodnog sporazumevanja". Li priskribis la lingvon, la organizaĵojn kaj la praktikajn utiligojn de la internacia lingvo, kaj mi verkis pri ĝia beletro. Tiaspeca legajo mankis en la serba medio kaj precipe estis dediĉita al la neesperanta publiko. Antaŭ ol presigi de la libreton li proponis al mi enmeti en la lastajn du paĝojn niajn



*La serba esperantista elito en "plena konsisto" dum sia lasta kunveno en "Srpska kafana" (Serba kafejo) en Beogrado, la 16-an de januaro 2013. Tie ili renkontiĝadis ekde 2007 ĉiumonate dum la tria merkredo por manĝi kaj diskuti gravajn priesperantajn temojn. Tie naskiĝis la ideo pri eldonado de "Beograda Verda Sielo", ekzemple. De maldekstre sidas Boriša Milićević (forpasinta la 2-an de februaro, nur du semajnojn poste), Adem Jakupović (forpasinta la 19-an de januaro, nur tri tagojn poste). Meze sidas Dimitrije Janičić kaj dekstre Zlatoje Martinov kaj Pribislav Marinković.*

de iamajn serblingvajn tradukojn de la Esperanta himno ("La Espero"). Nome, ni du tradukis ĝin tute sendepende unu de la alia, li en la jaro 1973, kaj mi en la jaro 1995. Ambaŭ tradukoj jam fariĝis konataj, ĉar ili estis publikigitaj antaŭe. Mia traduko de la himno esperantista estis publikigita en INFOSEL, la bulteno de la Serbia Esperanto-Ligo, en la sama, 1995-a jaro, sed mi ne rememoras kie aperis la lia. "Ĉu ni denove tion faru?", mi demandis. "Jes", li respondis, "kial ne? Kiu hodiaŭ ankoraŭ povas trovi tiujn niajn tradukojn? Do se ni volas la neesperantan publikon konatigi pri Esperanto, ni devas ankaŭ publikigi la poemon kiu havas siaspecan ideologian kaj programkarakteron de la lingvo kaj la movado. Kaj dank' al Boriša tio estis farita. Li ĉiam pensis pri ĉio.

Mi rememoras ankoraŭ unu detalon el la jaro 2001, kiam la beogradaj esperantistoj organizis la internacian renkontiĝon ne nur Esperante subtitolitan Danuba Esperanta kultura forumo (DESKF). Boriša estis invitita perbuŝe tradukadi en Esperanton kaj el Esperanto al la serba, laŭbezone li eĉ tradukis el Esperanto al la franca. La DESKF estis organizita en la ejo de la Filologia fakultato en Beogrado, kaj okazis ke mi dum la unua antaŭtagmeza kunsido sidis apud la dekano de la fakultato, d-ro Rade Božović. Vidinte Borišan sperte, lerte kaj senlace tradukantan (jen el Esperanto al la serba, jen el la serba al Esperanto, jen el la franca al Esperanto) la dekano min demandis: "Kiu estas tiu homo?" Mi klarigis ke li estas direktoro de la beograda Esperanto-Instituto kaj tre fama serba esperantisto kaj esperantologo, tradukisto kaj verkisto. La dekano kapklinis admire, kaj poste dum paŭzoj mi vidis lin kun Boriša amike interparoli. Boriša tiom impresis lin per sia traduklerteco!

Tre malĝojigis min la morto de Boriša, ĉar li (kune kun same nun jam karmemora Adem Jakupović) estis unu el la plej elstaraj serbaj esperantistoj kies eternan foriron oni sendube forte sentos.

## Josip Štajcar (1947-2013)



*✍ Radenko Milošević*

Kiel mi ekkonis mian forpasantan amikon Joža? En la jaro 1970 ni kunservis kiel flegistoj en la tiama armeo en Našice, la urbo de la kroata komponistino Dora Pejačević. Porflegista kurso daŭris preskaŭ duonjaron, sed oni povis trovi tempon por eliri el la kazerno kaj kuntrinki kaj babilu. Kaj ne nur tion! Ni kunlaboris en tiamaj armeaj gazetoj, pretigadis ĉiusemajnan radioelsendon por soldatoj. La krono de nia amikeco estis lia decido, kun multaj aliaj soldatoj, lerni Esperanton, kiun mi instruis laŭ la lernolibro de D. Maruzzi. Tiam li eĉ skribis en la gazeto de zagreba armea distrikto "Za domovinu", la artikon sub la nomo "Esperanto en la kazerno".

Li, profesoro pri matematiko kaj fiziko, estis tre bone akceptita ne nur inter gekolegoj sed ankaŭ ĉe gelnantoj en Petrinja. Lia scio pri fizikaj eventoj, speciale ĉar li estis kunurbano kun la kroata naturciencisto kaj astronomo Oton Kučera, estis fama. Priskribi la urbon kaj ĝian sorton dum milito, li evitis. Nome, post la reveno lia domo estis tute detruita!

Niaj vivoj estis iomete interplektitaj ankoraŭfoje en la jaro 1994/1995. Tiam li, kun la tuta familio, estis forpelita el sia naskiĝurbo Petrinja. Li hazarde fariĝis profesoro pri matematiko de mia filino Ivana, en la Bazalernojo "Pantovčak" en Zagrebo. Nia renkontiĝo estis tre kortuŝa, kaj multaj bildoj el la armeo elsaltis el niaj rememoroj.

Li estis membro de Esperanto-societo el Petrinja kaj samtempe de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj. Li partoprenis Boatadon sur la rivero Kupa en la jaroj 2011 kaj 2012. Josip estis membro de Kroata montgrimpa societo "Zrin" en Petrinja. Lia artikolo pri ekskurso al Medvidak, la montopinto ĉe Lagoj de Plitvice respegulis lian animon de montgrimpano.

Profesoro Josip Štajcar forpasis en Petrinja la 16-an de majo 2013.

## Miroslav Turković (1942-2013)



La 20-an de julio forpasis MIROSLAV TURKOVIĆ - TURKI (naskita en 1942), la membro de Bjelovara Esperantista Societo. Li esperantistiĝis en 1956 kune kun ĉiuj samklasanoj kaj fariĝis membro de loka societo. Li partoprenis la 1-an Junularan esperantistan laborbrigadon ĉe Cerknisko jezero en Slovenio (1969). Dum multaj jaroj neaktiva kiel movadano, li reaktiviĝis en 2010, estinte kunorganizanto de la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj en Bjelovar. En 2011 li estis unu el la refondintoj de Bjelovara Esperantista Societo kaj ĝia aktiva membro ĝis sia malsaniĝo kaj forpaso. En la bjelovara tombejo "Borik" la 22-an de julio de li adiaŭis dekdouo da samsocietanoj, kaj la adiaŭan leteron legis Nenad Margetić.



Mia Esperanta grupano telefonis al mi ke la de vi senditaj tri numeroj de "Zagreba Esperantisto" jam atingis Pekinon. Mi kaj miaj grupanoj kore dankas vin por tio. Mi ankoraŭ laboras en Ŝanhajo kaj mi revenos al Pekino post printempa festo.

**Zhang Yue (Ĉinio)**

Bonorde alvenis la revuo "Zagreba Esperantisto" n-ro 1/2013. La enhavo estas tre varia kaj la enpaĝigo tre profesia! Korajn dankojn. Mi montris ĝin al la lernantoj de la klubo Esperanto-la Ciotat, kaj donos ĝin iam ĉe UNESKO al reprezentanto el Kroatio. Pluajn sukcesojn en via agado.

**Renée Triolle (La Ciotat, Francio)**

Mi gratulas pro la ĉiam tre bela aspekto de "Zagreba Esperantisto" kaj la interesa enhavo. Precipe mi ŝatis la memorigan historion pri astronomio kaj kampadejo Primošteno, kien du fojojn triestaj esperantistoj iris kaj kampadis.

**Elda Doerfler (Triesto, Italio)**

Estas ĉiam plezuro por mi ricevi vian revuon kiu de jaro al jaro fariĝas tre prestiĝa. La numero 1/2013 atingis min antaŭhieraŭ. Krom la raportoj pri via enlanda movado sekvinda kaj revata ankaŭ de albanaj esperantistoj, kiuj antaŭ kelkaj tagoj renovigis sian asocion en la juĝejo, min atentigis la reago de prof. Renato Corsetti pri la kaŭzoj de la falo de Esperanto-movado en kelkaj landoj de Sudeŭropo. Certe en la eksaj centralizitaj, pli ĝuste totalismaj socioj, la ŝtato kiu permesis nur dekretitajn organizaĵojn kaj emis kontroli ĉies agadon, samtempe utiligi ĉion por la totala propagando, notinde helpis finance ankaŭ esperantistajn organizaĵojn, kiel ekz. en la eksa Jugoslavio, Bulgario, Pollando dum ne malhelpis tion en Albanio.

Ĝi helpas daŭre la esperantistan agadon en Ĉinio, Vjetnamio, Kubo kun la celo propagandi socialisman vivmanieron kaj reklami sian landon. Aliflanke ni havas, kiel tion rimarkigas mem prof. Corsetti, la floradon de esperantista movado en kelkaj okcidentaj landoj kiel Italio, Francio, Germanio, kie ĉefa faktoro kaj motoro estas mem entuziasmaj individuoj gvidantaj tiujn movadojn. Aktuale en la eksaj malfortaj socialismaj landoj Esperanto apenaŭ trovas subtenon far la ŝtato kaj ties edukaj organoj ĉar ankaŭ la registaroj emas al globalismo kaj anglismo rilatanta al ĝi. Ekz. en Albanio mem la ĉefministro estas elektita kiel honora prezidanto de la anglemuloj, aliaj ŝtataj altranguloj, prezidantoj de francemuloj, germanemuloj, italemuloj k.a. Kion ekspektus esperantistoj ĉi-kaze? En la fremdlingva fakultato en Tirana ŝtata universitato la dekano konfesas plende ke la angla eklipsigis la ceterajn lingvojn instruatajn, ne menciante pri Esperanto. Do, laŭ mi la sola vojo estas ke ni mem, esperantistoj, baraktu kaj firme daŭrigu nian mision: disvastigadon de IL je niaj propraj sakrificoj.

**Bardhyl Selimi (Albanio)**

Dankon pro la nova numero de la gazeto "Zagreba Esperantisto". Ĝi estas enhavoriĉa, luksa papero, belaj koloraj fotoj. Aspektas kiel "moderna" gazeto. Ĝi povus esti sendata al franco, kiu verkis en Ondo (lasta numero) pri kiel malmodernaj aspektas la esperantaj revuoj! La literoj estas iom eble tro malgrandaj, sed mi komprenas, ke tio eble devas esti por "ŝpari" paperon. Tamen helpas al legado la mallongaj linioj. Ankaŭ la titoloj de la paĝoj faciligas la legadon. Mi "feras", ke mia rakonto aperas en tia revuo! La priturismajn paĝojn mi legis kun intereso, por prepari min por la feriado ĉe Adratika Maro.

**Kerstin Rohdin (Svedio)**

Mi dankas vin pro via revuo kiu bonorde atingis min. Mi ne abonos ĝin ĉar mi jam havas multajn revuojn legeblajn, sed mi kuraĝigas vin en via eldona laboro.

**J. Monneret (Francio)**

Mi skribas por danki al vi pro la du numeroj de via bela revuo donace senditaj al mi, en unu el kiuj estas mia artikolo, kiun vi ĝentile publikigis, kaj, kompreneble, pro la publikigo de la artikolo mem. Nun mi sendas novan artikolon, kiun, se, laŭ mia espero, ĝi plaĉos al vi, vi povos aperigi en venonta numero. Korajn salutojn kaj denove mil dankojn.

**Nicola Morandi (Capostrada, Italio)**

La gazeto mem estas tre bonkvalita, ne nur ĝia aspekto, sed ankaŭ la enhavo.

**Erzsebet Szekely (Szeged, Hungario)**

Mi partoprenis kunvenon de Esperanto-societo "Ruta" en Vilno (Litovio), kiun mi kelkvorte salutis kaj donacis al la societanoj la gazeton "Zagreba Esperantisto". Pluraj ĉeestintoj kun granda estimo laŭdis ĝin.

**Vladimir Jurković (Zagrebano, portempe en Litovio)**

Dankon pro la alsendo de via revuo "Zagreba Esperantisto" n-ro 1/2013 kaj la mencio de mia nomo (paĝo 9) kun la noto "la bildkarto bedaŭrinde perdiĝis survoje". Ankaŭ dankon pro la bildkarto de Bjelovar sendita en la revuo ZE.

**Nicholas Nevan Batu Ferringhi (Penang), Malajzio**

### NOTO DE LA REDAKCIO:

Laŭ informo de s-ro Franjo Forjan, la prezidanto de Bjelovara Esperantista Societo, la bildkarto de s-ro Nevan tamen alvenis la 27-an de februaro, post trimonata "aviadila"



vojaĝo de Malajzio al Kroatio! Ni pardonpetas s-ron Nevan pro la malĝusta informo publikigita en la artikolo "Bildkarta ekspozicio" (n-ro 1/2013, paĝo 9)

Estas agrable legi vian revuon kiu enhavas multajn riĉajn artikolojn kaj bonkvalitajn fotojn. Ĉiu numero bele aspektas. Mi tralegis ĉiujn ricevitajn numerojn kaj trovis interesajn priskribojn ankaŭ pri personoj kiujn mi konis.  
**Fani Rižnar (Izola, Slovenio)**

Multan dankon pro la sendita "Zagreba Esperantisto" 1/2013. Ĝi estas tre interesa kaj bonege redaktita. Gratulon! Bonvolu seedi al mi ankaŭ la ceterajn numerojn de tiu ĉi jaro.  
**Jürgen Hamann (Leipzig, Germanio)**

## KOREKTO

En la "Granda vortaro kroata-Esperanta" de Lucija Borčić sur la paĝo 65, troviĝas malĝustaĵo: **ĉinele** (*glazb*) cimbalo, zimbalo.

**Cimbalo** (vidu la foton n-ro 1) estas muzikilo konsistanta el du metalaj diskoj, kiujn oni frapas unu kontraŭ la alia. Kombinita kun drumoj, tiu instrumento povas esti lokita sur vertikala metala stango kaj ludata per pedalmovoj, aŭ per frapado de lignaj drumbastonetoj. Kroate: *ĉinele*.



**Zimbalo** (vidu la foton n-ro 2) estas tute alia kordinstrumento, kiun oni frapas per martelo aŭ du vergetoj, speciale konata en Hungario kaj en kontinenta parto de Kroatio. Kroate: *cimbale, cimbule*.



## Nia leterkesto



65,00 kunaoj / 9,00 eŭroj

Mendu ĉe: [grafokom@kc.htnet.hr](mailto:grafokom@kc.htnet.hr)

## SOMERUMI ĈE ADRIATIKA BORDO

Oni povas somerumi apud adriatika marbordo je tre popularaj prezoj, ĝuante la maron, vizitante turismajn kaj historiajn vidindaĵojn, la insulojn Braĉ, Hvar, Korĉula kaj la urbojn Trogir, Split, Omiš, Makarska ... kaj ĉion ĉi en Esperanta etoso. Mendu la loĝadon 15 tagojn antaŭ via alveno ĉe:

**Davor Grgat**  
Mali Rat, "Esperanto"  
21215 Dugi Rat  
telefono: +385 (0)91 797 22 70  
[grgat.esperanto@email.t-com.hr](mailto:grgat.esperanto@email.t-com.hr)





DAN  
ESPERANTA  
2013

Jezična pravednost

26. srpnja 2013